

BRAZILA ESPERANTISTO

53-A JARO

OKTOBRO - DECEMBRO 1959

N.º 547-549

ZAMENHOF

INICIADOR DO ESPERANTO



OKTOBRO-DECEMBRO

53-a Jaro

N.º 547-549

BRAZILA ESPERANTISTO

(“O Esperantista Brasileiro”)

Oficiala organo de

BRAZILA ESPERANTO-LIGO

Societo de publika utileco, laŭ registara dekreto N. 4356, 26 Oktobro 1921

Direktoro :

A. CAETANO COUTINHO

Respondeca redaktoro (redactor principal) :

D-ro CARLOS DOMINGUES

Administracio kaj Redakcio :

Praça da República, 54, 1.º

Telefono : 42-4357

Sidejo de la Brazila Societo de Geografio

RIO DE JANEIRO — BRAZILIO

Senpaga por anoj de B. E. L.

Eksterlande : unu dolaro aŭ 15

respondkuponoj

QUOTA ANUAL DE ADESÃO A LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO 1959

(De acordo com os Estatutos todos os membros são automaticamente filiados à organização mundial)

Membro Simples : recebe a carteira de sócio, os cupões de serviço e o “Brazila Esperantisto”	100,00
Membro com direito ao Anuário : recebe o mesmo que o antecedente e mais o Anuário do movimento esperantista	350,00
Membro Assinante : recebe o mesmo que o antecedente e mais a revista “Esperanto”	600,00
Membro Mantenedor : recebe o mesmo que o Membro Assinante ...	1.000,00
Patrono : recebe o mesmo que o Membro Assinante	5.000,00
Membro Vitalício : recebe o mesmo que o Membro Assinante	12.000,00

Tôdas as importâncias devem ser remetidas em cheque bancário ou vale postal à

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO
PRAÇA DA REPÚBLICA, 54, 1.º
Rio de Janeiro, DF.



L. L. Zamenhof — 1887, jaro, en kiu aperis Esperanto.

NIA KOVRILO

La kovrilo de ĉi tiu numero estas represaĵo de la kovrilo de la libro “Zamenhof — Iniciador do Esperanto”, de A. Lopez Luna, portugalen tradukita de Carlos Domingues.

La bela libro, tre taŭga por donacoj, estas eldonaĵo de Irmãos Pongetti kaj troviĝas en ĉiuj bonaj librovendejoj en Brazilo.

Prezo — broŝurita Cr\$ 160,00

bindita Cr\$ 250,00

BRAZILA ESPERANTISTO

53-A JARO

OKTOBRO - DECEMBRO 1959

N.º 547-549

CENTJARO DE ZAMENHOF

ALPAROLO DE LIA EKSCLENCO PROF. D-RO CLOVIS
SALGADO, MINISTRO DE EDUKADO KAJ KULTURO

ĈE LA PAROLA BULTENO DE AGÊNCIA NACIONAL "VOÇO DE BRAZIL" 10
JE LA 15-a DE DECEMBRO 1959.

La tuta civilizita mondo memor-solenas hodiaŭ la centjaran datrevenon de la naskiĝo de tiu eksterordinara viro Lazaro Ludoviko Zamenhof, kiu kreis novan lingvon, lingvon por ĉiuj popoloj, idiomon por servi pli bonan komprenpovon inter ĉiuj homoj: Esperanto.

Naskita en Litovujo, hebreo laŭ la raso kaj ruso laŭ la politika dependeco, ekde la infaneco li renkontis embarasojn por esprimi sin per tri lingvoj — litova, juda kaj rusa — havantaj tri malsamajn alfabetojn. Kiam li fariĝis junulo, liaj gepatroj transloĝiĝis Varsovion, kie li kompletigis la gimnazian lernadon kaj la medicinan, en la tiea universitato. Tiam li devis esprimi sin per kvara lingvo — la pola.


Vivante meze de kruelaj, sangmakulitaj luktoj en sia patrujo, kie tri popoloj vetbatalis, ne sin interkomprenante en tri malsamaj lingvoj, Zamenhof imagis, ke la uzado de komuna neŭtrala lingvo povus kunefiki por kvietigi la pasiojn kaj favorigi pli bonan komprenpovon inter la homoj. Kaj tiu ideo fariĝis por li la precipa celo de lia vivo. Li laboris senĉese, seninterrompe, venkante gravajn materialajn malfacilojn, por

kunmeti ilon destinitan al kultura alproksimiĝo de ĉiuj popoloj en la universo, je profito de paco kaj de progreso.

Lia ideo penetris en la mensoj kaj en la koron de la homoj. Ekde la unua Kongreso, en 1905, ĝis nun jam efektiviĝis 44 universalaj kongresoj de Esperanto kaj okazis 16 naciaj kongresoj en Brazilo, la unua lando, kiu oficiale akceptis Esperanton kiel "lingvon klaran" por telegramoj en la landa servo.

Omaĝe al la centjaro, kiun hodiaŭ oni festas, la Brazila registaro eldonis memorigan poŝtmarkon. Ĉio ĉi bone elmontras la akcepton, kiun en nia lando havigas Esperanto — helpa lingvo, kiu ne intencas substitui la naciajn idiomojn, sed nur faciligi la intelektajn rilatojn inter ĉiuj popoloj de la terglobo. Ĉio kredigas, ke la nobla revado de Zamenhof fariĝos mirinda realaĵo, kun la kreskado de la tempo. Tiel pensas kaj tiel deziras la Ministerio de Edukado kaj Kulturo, kiu nun tributas al la granda idealisto sinceran omaĝon de danko kaj admiro, ankaŭ dediĉitan al la kulturantoj kaj propagandantoj de la luma Zamenhova majstroverko.

IMPONA LA XVI.^A BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO OKAZINTA EN URBO SALVĀDOR



Ĝenerala grupo de kongresanoj post la vizito al la Muzeo de Religia Arto.

Vera, grandega kaj atendata triumfo estis la XVI-a Brazila Kongreso de Esperanto en Salvador en la kadro de la Zaĉenhof-Jaro.

Kiam en la XV-a en Niterói oni aklamis la unuan ĉefurbon de Brazilo por loko de la sekvonta esperantista manifestacio, samideanoj el Bahia iom hezitis sendube pro modesteco. Sed efektive Salvador estas juste konsiderata ideala urbo por iuj ajn kunvenoj. Oni povas eĉ diri, ke nura vizito al Bahia jam estas kongreso: kulturo, tradicio, progreso, pejzaĝo, klimato, popolo, ĉio estas tute ŝatinda kaj alloga. La lasta Kongreso ne povis do ne plensukcesi.

LA ORGANIZA KOMITATO

Al Bahia Esperanto-Asocio apartenis la preparlaboroj por la Kongreso. La programo zorge organizita estis vasta kaj efika. Tiucele laboris dum pli ol unu jaro la Organiza

Komitato, konsistanta el jenaj personoj: Honora Prezidanto D-ro Edgard Rego Santos, Rektoro de la Universitato de Bahia; Prezidanto Prof-ino Vivaldina de Magalhães Caymmi; 1-a Sekretario S-ro Hermes de Deus Pitta; 2-a Sekretario Kap. Godofredo de Araujo Goes; Kasisto S-ro Alvaro Claudiano Carvalho. *Sekcio por informado* Prezidanto Prof. Leopoldo Knoedt; Membroj — S-roj Antônio Loureiro de Souza, Virgílio Sobrinho, Antenor Teixeira, Aristóteles Gomes Filho, Farm. Origenes Calmon Du Pin e Almeida, Radiistoj Gilberto Mascarenhas, Ulisses Floquet kaj Prof. Hermano Gouveia. *Sekcio por akceptado*: Prez. Prof. Manoel Borges dos Santos; Membroj — Ing. Nid Dutra d'Amorim, S-ino Iracema Knoedt, Prof-ino Mariana Cerqueira Lima, F-ino Enaura Batinga de Mendonça, Ing. Ivo Vivas kaj Monaĥo Edvaldo Raggula, O. F. H. *Sekcio por Loĝado*,

Transporto kaj Ekskursoj: Prez. Prof. Onias Almeida; Membroj — Inĝ. Alexandre Guedes, Kap. João Alves dos Santos, S-ro Rubem dos Santos Dias, Prof-ino Suzete Maria Fonseca, S-ro Edmilson Moura kaj S-ro Wilson Carvalho Nascimento. *Sekcio por Financo:* Prez. D-ro José Siquara da Rocha; Membroj: Inĝ. Jaddo C. Maciel, Prof-ino Leda Matos kaj Kap. Godofredo de Araujo Goes. *Sekcio por Arto kaj Kulturo:* F-ino Nair da Costa e Silva; Arta Direktoro — D-ro Walter Rui Soares dos Santos; Membroj: Prof-ino Angelita da Cunha Dias, S-ino Iracema Knoedt, Arki-tektino Vilma Campos, Prof-ino Mariana Cerqueira Lima kaj Prof-ino Leda Matos.

LA KONGRESA ESTRARO

La Prepara Kunsido okazis en la 17-a de Oktobro, sabato, en la aŭlo de la sidejo de Asocio de Publikoficistoj kaj malfermis ĝin la Prezidantino de la Organiza Komitato Prof-ino Vivaldina de Magalhães Caymmi, kiu invitis D-ron Carlos Domingues, Prezidanton de B.E.L. gvidi la kunsidon. D-ro Domingues, en Esperanto, salutis la ĉeestantojn kaj faris konsiderojn pri la graveco de la Kongreso. Li anoncis la celon de la kunsido, kiu estis la elekto de la Estraro.

S-ro Gert Druker, el Paraná, proponis, ke la elekto estu farita per aklamado; post unuana aprobo li proponis jenajn personojn, kiujn la kongresanoj ankaŭ aprobis: Prez. Supera Juĝisto D-ro J. Jerónimo de Albuquerque, el Alagoas; Vic-prez. Pastro Francisco Barros Leal S. J., el Pernambuco, D-ro Carlos Rezende el Minas Gerais, kaj D-ro Joaquim Couto, el Ŝtato Rio de Janeiro; Gen. Sekretario — Manoel Borges dos Santos, el Bahia; 1-a Sekretario —

D-ro Francisco José Soares Portugal, el Paraná; 3-a Sekretario — Hermes de Deus Pitta, el Bahia.

D-ro José Jeronimo de Albuquerque enoficiĝis, dirante en Esperanto dankajn vortojn kaj enoficiĝis la ceterajn estraranojn.

MESO

En la sekvanta tago matene Pastro Barros Leal S. J., en la Kapelo de Sankta Tereza faris meson kaj predikon en Esperanto pri Sankta Luko, kiu estis kuracisto same kiel Zamenhof mem. Kongresanoj de diversaj religioj ĉeestis la meson dum kiu la Ĥoro de la Universitato de Bahia ludis la muzikaĵon *Missa Brevis* de Pierluigi Palestrina.

Post la meso la esperantistoj vizitis la famkonatan Muzeon de Religia Arto, kiu faris impreson al ĉiuj pro la grandvaloraĵaj antikvaĵoj tie enestantaj.

MALFERMA KUNSIDO

La saman dimanĉon, je la 20-a, okazis la solena malfermo de la Kongreso en la luksa palaco de la Rektorejo de la Universitato de Bahia. D-ro J. Jeronimo de Albuquerque en Esperanto salutis la Kongreson kaj invitis la Rektoron Edgard Rego Santos prezidi la solenon. Ĉe la tablo sidis Federaciaj, Ŝtataj kaj Komunumaj Aŭtoritatuloj aŭ iliaj reprezentantoj. La vasta salono estis tute plena de kongresanoj kaj de interesata publiko. Sekve estis farita la kutima oficiala saluto de la prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo. La parolado de D-ro Carlos Domingues, komence en Esperanto kaj poste en la nacia lingvo ricevis multajn aplaudojn. D-ro Benedito Venceslau parolis por la esperantistaj asocioj.

La podio en la Malferma Kunsido — de maldekstre: D-ro José Siquara da Rocha, Prezidanto de Esperanto Asocio de Bahia; Prof. D-ro Carlos Domingues, Prezidanto de BEL; Supera Juĝisto José Jerônimo de Albuquerque, Prezidanto de la Kongreso; Lia Rektora Moŝto Prof. D-ro Edgar Rego Santos; la reprezentanto de la Statestro; D-ro Campos França, reprezentanto de la Urbestro; Prof. D-ro Jorge Calmon, Direktoro de la ĵurnalo "A Tarde" kaj oficiala parolanto; S-ro Manuel Borges dos Santos, Ĝenerala Sekretario.



Profesoro Pedro Calmon, invitita kiel oficiala oratoro de la soleno, ne povis ĉeesti pro grava motivo, kiu montriĝis iom antaŭ la horo veturi ĝis Bahia. Tiel, li telegrafis al d-ro Jorge Calmon, ke ĉi tiu anstataŭ lin, dirante inaŭguran oracion.

Jen kial la redaktoro de la ĵurnalo "A Tarde" improvize preparolis la personecon kaj vivon de la aŭtoro de Esperanto, kies centa datreveno de lia naskiĝo okazis. Multe da fojoj aplaudita de la ĉeestantoj, li vaste parolis pri la celoj, kiuj igis la litovan kuraciston krei la internacian idiomon. Li uzis la okazon por diri, ke Esperanto estas kvazaŭ planizita-



Parto de la ĉeestantoj

urbo — ekzemple Belo Horizonte aŭ Brasilia — speciale konstruita laŭ la principoj de la bona urboplanismo, por akcepti la estontajn loĝantojn. Tiel ankaŭ Esperanto, kiu en la lingvistika kampo estas kvazaŭ ia urbo, zorgeme projektita. Zamenhof konstruis ĝin, utiligante teknikon similan al tiu, kiun senkonscie uzas la generacioj, por tra jarcentoj formi lingvon, idiomon. Kaj celante la morgaŭan mondon, tiun estontan mondon, kiun oni modeligas laŭ la procesoj pli kaj pli rapidaj por la komunikigoj de la pensoj, li volis anticipi pri la tempo, oferante al la estonta socio homara ĝian esprimmanieron. Finante, li parolis pri la idealoj de universala solidareco, sub forta aplaŭdado.

LABORKUNSIDOJ

Kun la ĉeesto de la plej granda parto de la Kongresanoj okazis 6 laborkunsidoj. 1-a laborkunsido — En la 19-a matene — La sekretario legis plurajn telegramojn kaj salutleterojn. D-ro Mario Ritter Nunes faris paroladon pri la karmemora D-ro Mario Augusto Teixeira de Freitas,

kiu, kiel ĝenerala sekretario de Brazila Instituto de Geografio kaj Statistikado donis viglan impulson al nia Movado. Lastaj vortoj de Teixeira de Freitas diritaj al la parolanto estis: "Zorgu pri nia Esperanto!"

2-a laborkunsido — En la 19-a posttagmeze — F-ino Irani Baggi de Araujo parolis pri sia patro la Supera Juĝisto D-ro Jacome Martins Baggi de Araujo, kiu naskiĝis en Santo Amaro, kaj estis la unua brazila esperantisto. Honorigante Baggi de Araujo kaj Teixeira de Freitas, la Kongreso volis reliefigi la agadon de du eminentaj esperantistoj el Bahia. Elokvente parolis poste la studento Edmilson Moura, kiu reprezentis la esperantistan junularon en Bahia.

3-a laborkunsido — En la 20-a matene — La programo de la Kongreso enhavis paroladojn de la brazilanoj, kiuj konis persone Zamenhof: la laboraĵo de Prof. João Baptista Melo e Souza, el Rio de Janeiro, kaj de D-ro Benjamin Camozato, el Porto Alegre, estis komunikitaj al la kunsido. Pastro Barros Leal S. J. prezentis proponon pri la enkonduko de Radio-amatoreco en la Esperanto-Movadon. Pri la afero parolis S-ro Pedro Brennaise kaj aliaj kongresanoj, kaj la propono estis aprobita.

4-a laborkunsido — En la 20-a posttagmeze — Post diskutado la Kongreso aprobis kun amendoj la tezon prezentitan de D-ro Elias Couto de Almeida sub la titolo "Pri la neceso ke la Esperanto-Movado forte similigu al la ceteraj altnivelaj movadoj".

5-a laborkunsido — En la 21-a matene — La Prezidanto nomis diversajn komisionojn por vizito al la aŭtoritatuloj. Estis disdonitaj diplomoj al 40 lernintoj de Associação Bahiana de Esperanto. Por la diplomitoj parolis la blinda junulo João

José do Nascimento Junqueira kaj por ABE D-ro Nid Dutra d'Amorim.

6-a laborkunsido — En la 22-a vespere — Estis legita telegramo, kiu anoncis, ke la Ministro de Trafiko kaj Publikaj Laboroj, Admiralo Amaro Peixoto, ordonis la eldonon de postmarko memoriga pri la centjaro de Zamenhof laŭ peto de Brazila Esperanto-Ligo. La tezo de D-ro Mario Ritter Nunes pri la unueco de la esperantista gazetaro en Brazilo estis diskutita kaj aprobita. La kongreso aprobis jenajn proponojn:

De D-ro José Siquara da Rocha — konsulto al BEL pri ebleco okazigi en Brazilo Universalan Kongreson: dankesprimon al Rektoro D-ro Edgar Rego Santos por la grandaj servoj faritaj al la Kongreso, al S-ro Menotti Del Picchia por la permeso enscenigi lian teatraĵon "La Maskoj" kaj al S-ro Geraldo Matos, kiu cedis sian tradukadon; propono, por ke la esperantistaj kuracistoj klopodu por publikigo de Esperantaj resumoj en medicinaj revuoj.

De D-ro Carlos Domingues — gratulesprimo al D-ro Edmond Privat pro liaj 70 jaroj; dankesprimoj al Prof. Americo Jacobina Lacombe, sekretario de Edukado kaj Kulturo de la Federacia Distrikto, pro la apogo donita al nia Movado, speciale por la starigo de monumento al Zamenhof en Rio de Janeiro; al D-ro Vicente Guimarães, direktoro de la Revuo Sesinho en kiu aperadas esperantaj lecionoj; al Fratoj Pongetti pro la daŭra kunlaboro per Esperantaj eldonaĵoj; kaj deziresprimo al Prof. Jurandir Pires Ferreira koncerne la presadon de "Kanaan" kaj de la albumo Urbo Salvador;

De F-ino Irani Baggi de Araujo — gratulesprimo al nia veterano Antonio Caetano Coutinho, kiu ĵus atingis sian 80-an jarojn kun pli da

60 jaroj da sindona laboro por Esperanto; dankesprimoj al Generalo Francisco Jaguaribe de Matos, Prezidanto de Brazilia Societo de Geografio, en kies domo B.E.L. havas sian sidejon de pli ol 50 jaroj; al Kolonelo Humberto Peregrino, direktoro de la Biblioteko de la Armeo, kiu eldonas en Esperanto la romanon "Inocência";

De S-ro Paulo de Amorim Cardoso — aplaŭdesprimoj al Prof-ino Mariana Cerqueira Lima kiu verkis la Himnon de la Kongreso;

De S-ro Octaviano Curvelo de Sousa — dankesprimoj al la urbestro de Salvador Prof. Heitor Dias Pereira, kiu multe helpis al la realigo de la Kongreso;

De Prof-ino Vivaldina Caymmi — dankesprimoj al Asocio de Publikaĵaj Oficistoj, kiu afable permesis la uzadon de sia salono;

De Ing. Jaddo C. Maciel — memoriga esprimo al la brava pioniro Ing. Alberto Couto Fernandes kies naskiĝa datreveno okazos en la sekvanta tago.

VIZITO AL AŬTORITATULOJ

Vizito al aŭtoritatuloj, kiuj forte kontribuis al plena sukceso de la Kongreso estis farita de komisionoj speciale nomitaj. Tiuj komisionoj vizitis la Ŝtatestron, la Urbestron, la Sekretarion de Edukado kaj Kulturo, la Sekretarion de Trafiko, la Ŝtatan Parlamenton kaj la Rektoron de la Universitato de Bahia. Ankaŭ la Gazetaro kaj la Radistacioj estis vizititaj. Al ĉiuj la Kongreso esprimis dankon por la ricevita apogo.

ARTFESTO

En ĉiu kongreso estas parto, kiu estas preferata de ĉiu, sed oni povas aserti sen ia dubo, ke la arta estas

plej ŝatata de la kongresanoj, ĉar en ĝi oni vidas Esperanton vivanta. Granda ĉeestantaro venis en la belan Teatron "Oceânia" ĉe Barra. La Ĥoro de Gimnazio Taylor-Egidio, el urbo Jaguaquara, konsistanta el 15 junulinaj, mirinde kantis la Himnon de la Kongreso kaj ĉarmajn regionajn kantaĵojn. Inter la lastaj oni aŭdis "La Groto de Ituaçu", kaj Bahian Patrino kun vortoj de Prof-ino Stela Câmara Dubois en traduko de Prof. Leopoldo H. Knoedt. En la interspacoj deklamis F-inoj Nilze Ferreira, Judite Peixoto, Eny Kleyde Vasconcelos, kaj Isabel Pita Lemos. Tiu parto de la festo estis lerte gvidita de gesinjoroj Dubois. Post mallonga parolado de D-ro José Siquara da Rocha, kiu kompetente analizis la verkaron de Menotti del Picchia, oni vidis la tre konatan teatraĵon de tiu fama verkisto "La Maskoj", tradukitan de Geraldo Matos. La roluloj estis Osaneia Macedo de Lima (Kolombino) Geraldo del Rei (Arlekino) kaj José Passos Neto (Pierro). Direktoro estis D-ro Walter Rui. La tuta artavespero plene plaĉis kaj estis entuziasme aplaŭdita.



La Ĥoro de Gimnazio Taylor-Egidio

EKSKURSOJ

La tagoj 22-a kaj 23-a estis rezervitaj al ekskursoj. La unua estis

al la petrolkampoj en Mataripe kaj la alia al Itapoã kaj al lago Abaeté, kie la ekskursintoj estis regalitaj per bongustaj regionaj manĝaĵoj.

VIZITO AL LA HISTORIAJ LOKOJ

Malgraŭ la senĉesa pluveto kiu faletis sur la urbon, grandnombraj kongresanoj vizitis la historiajn lokojn de la malnova Salvador, kies monumentoj vokis la memoron pri la graveco de ĉio, kion oni vidis, ĉar tio estis scenejo kaj atestanto de neforgesendaj historiaj okazaĵoj.

FERMA KUNSIDO

Neforgesebla nokto tiu de la 24-a, kiam la aŭlo de la Rektorejo plenkomprena de aŭtoritatuloj, simpatiuuloj kaj esperantistoj ĝuis la plezuron aŭdi la orkestron de la Rektorejo, kiu perfekte ludis la uverturon *Egmont*, de Beethoven.

Post malfermo de la soleno okazis la kutima omaĝo al la mortintoj ekde la lasta Kongreso. Oni aŭdis la liston faritan de la Prezidanto de BEL kaj la ĉeestantaro restis silenta dum unu minuto.

La Rektoro de la Universitato de Bahia, Prof. Edgar Rego Santos, sin turnis al la Kongreso per parolado, kiu ricevis longan aplaŭdodon kaj kiun ni tradukas en Esperanton:

PAROLADO DE D-RO EDGARD SANTOS

Ĉi tiu kongreso, via Brazila Kongreso de Esperanto elmontras realigon, kiun ni ne povas preterlasi kompreni kaj prestiĝigi.

Vi estas batalantoj pro idealo universalisma, ĝuste ĉe tiu konvinka punkto de paco inter la homoj kaj la nacioj, nome la problemo de la

lingvaĵo. Tiel, vi proksimiĝas al ni, la universitatanoj, alportante al tiaj pensamaj homoj novajn rimedojn por la konsiderinda interkompreno, precipe en la internacia plano, tial ke la kulturo ne elĉerpiĝas nek estas hermetika, sed cirkulas kaj vivas en ĉiuj kvin partoj de la terglobo, je la fundamenta ligilo de ĉiuj kampoj kaj latitudoj.

En ĉi tiu Domo, kie oni ankaŭ kulturas la penson pri libera mondo, en ĉi tiu Domo, kie la regionismo ne senkoloriĝas aŭ malfortiĝas, sed ankoraŭ riĉiĝas kaj karakteriziĝas laŭ la inspiro de ĉia direkto, sekve vi troviĝas tie ĉi spirante vian propran atmosferon.

Vi posedas la idealon de kompreno inter ĉiuj homoj per komuna lingvo, artefarita formo (kiel multaj personoj tian rimarkas), tamen ne pri tio malakceptebla, ĉar ĝi estas formo de fakta interpenetrado en la spiritojn, eĉ pli oportuna por la manifestado de la plej kaŝita, rafinita sentemo, kaj sendube taŭga por la tuja, utilcela komunikado.

Efektive, sen la pretendo substitui la aktualajn lingvojn, la naturajn idiomojn, neniuj povas nei la valoron de Esperanto kiel kunhela elemento por ligilo de la animoj, tra kiu oni ekvidas novajn kampojn de stimulo kaj entrepreno, eĉ ĉe la propra regiono de la lingvosciencaj scioj, ĉar ĝi sin apogas sur la mekanismo de la naturaj lingvoj. Tiel ne pravus ja tiuj, kiuj ĝin kritikis, neante al ĝi la rajton de ekzistado, admiro kaj kunhelpo de kleraj homoj.

Nu, ĉu ankaŭ la klereco ne vere estas grandparte artifiko de la inteligenteco? Ĉu la klereco, spirita kreado, ne estas tiu impulso de eltrovo kaj kreo, kiu devenas el la fundo de la animoj, sed disvolviĝas kaj pligrandiĝas por la racia, utilcela

aranĝo de la konoj, kiuj servas al bonstato kaj kontentigo de la homaj bezonaĵoj? Tia estas ankaŭ via agmaniero, ĥo brazilaj esperantistoj; nobla estas la idealo, kiu vin kunligas, alta kaj plenumebla, kaj sendube triumfonta, ne nur pro la nombro, kiel ankaŭ pro la kvalito, ĉiam pli alta, de la adeptoj de Zamenhof.

Ke ĉi tiu Kongreso fariĝu plia paŝo, granda kaj firma, sur la rekta vojo de viaj venkoj — jen la deziresprimoj, kiujn ni tre sincere faras, ĉar pri tia speco de bataloj kaj konkeroj nia hodiaŭa mondo montras grandan neceson.

Same kiel vi klopodas por la mensa interproksimiĝo de la individuoj, ankaŭ ni tie ĉi defendas la interfratiĝon de la kulturoj, kiujn ni ne deziras diserigitaj aŭ senkaraktarigitaj. Kontraŭe, pli vivaj kaj perfektaj, pli indaj ili devas ekzisti, kiel novaj elementoj por la kompleksa kompreno de la mondo. En kuneco kun ĉiuj ĉi realaĵoj kvalifikitaj kaj alte reprezentaj, vi okupas nedubeble reliefan lokon Tiel do ni akceptas vin kaj en la nomo de ĉi tiu Universitato — esprimo evidenta de la kulturo de Bahia, ĉe tiu bona okazo ni salutas ne nur vin, lokajn esperantistojn, pozitivajn elementojn de nia komuna vivado, sed speciale vin, samlandanojn el aliaj ŝtatoj, samlandanojn kies ĉeeston ni konsideras ĉiam kortuŝite, ĉar vi estas vere la reprezentantojn en Bahia de nia kara patrujo! Al ni, tiu kontenteco elstariĝas precipe pro la favora okazaĵo, kia estas tiu-ĉi kunveno je kulturaj celoj, kun la penso turnita al interkomunikiĝo de nia popolo kun la klerigaj kreaĵoj de ĉiuj popoloj tra la mondo.

Sekve daŭrigu, brazilaj esperantistoj, vian laŭdindan kampanjon, kaj la posteularo estos danka al vi.

En la nomo de Associação Bahiana de Esperanto ĝia Prezidanto D-ro José Siquara da Rocha parolis kun danko kaj adiaŭo al la kongresanoj.

La juĝisto D-ro Carlos Resende proponis kaj la kunsido aprobis favoran esprimon al la Unuiĝintaj Nacioj kun sendo de letero en la ĝusta tago de la datreveno de fondo de UN.

La Prezidanto de la Kongreso, Supera Juĝisto D-ro José Jeronimo de Albuquerque, per kortuŝitaj paroloj dankis ĉiujn, kiuj kunagis por la brilo de la fermata Kongreso kaj ilin adiaŭis ĝis la venonta Kongreso en Porto Alegre.

Kun aplaŭdoj kaj reciprokaj amikaj salutoj la granda ĉeestantaro disiĝis.

LA ADIAŬO

La Direktoro de turismo, D-ro Vasconcelos Maia, ĝentile akceptis la kongresanojn per agrabla festo sur la granda teraso de la Alta Urbo — Belvidejo de Sé, kie ili estis regalitaj per lunĉo. Tiam oni havis okazon admiri la ludistojn per "Capoeira" (regiona atleta ludo), ĉefe la 70-jaran estron, "Mestre Bimba", kiu montriĝis pli rapidmova ol siaj disĉiploj mem. Inter la lastaj distingigis lia sesjara nepo.

En tiu festo elokvente parolis Prof-ino Vivaldina Caymmi, kaj Kap. Alfredo Godofredo de Araújo Goes, membroj da la Organiza Komitato, D-ro Pinto de Aguiar, Sekretario de Financo de la Komunumo, kiu efike apogis la Kongreson kaj S-ro Paulino Santiago, la plej malnova delegito de la Movado en nia lando.

Kiam la kongresanoj ekdisiĝis, ili eksentis misteran korenuon, misteran korpremon nur klarigeblan per la vorto saŭdado. Ili haltis sur la teraso de la Alta Urbo. Ŝajnis al ili,

ke ie la ĉielo tuŝetis la maron kaj kortuŝite ili memoris pri la paroloj de Zamenhof en la Bulonjo-sur Mara Kongreso kaj nur tiam ĉiuj komprenis ilin, nur tiam ili komprenis la feliĉon esti esperantisto.

DIVERSAJ FAKTOJ

— Aliĝis al la XVI-a 382 kongresanoj, el kiuj 315 ĉeestis la Kongreson. Sin reprezentis aŭ salutis la Kongreson la Prezidanto de la Respubliko, la Ŝtatestroj de Amazonas, Pará, Maranhão, Rio Grande do Norte, Paraíba, Pernambuco, Alagoas, Bahia, Espírito Santo, Rio de Janeiro, São Paulo, Paraná, Santa Catarina, Rio Grande do Sul, Minas Gerais, Mato Grosso, kaj la Urbestroj de Areia Branca, Caratinga, Salvador, Muritiba, Una, Ibicaraí.

— Notinda okazaĵo de la Kongreso estas la eldono en Esperanto de "Elektitaj Poemoj" de la genia poeto Castro Alves. Majstre ilin tradukis nia inteligenta samideano kaj poeto Leopoldo H. Knoedt. Elstara cirkonstanco estas, ke la eldonon faris la Universitato de Bahia. Laŭ tradicio de la Brazilaj Kongresoj, kies publikigaĵoj estas donacitaj al la kongresanoj, ankaŭ nia XVI-a disdonos senpage al la aliĝintaj membroj tiun grandvaloran verkon.

— Denaska esperantisteto vekis la admiron de la kongresanoj, fakte konversaciante en Esperanto. Li estis la iomete pli ol dujara knabeto Augusto Carlos, filo de gesinjoroj Hyzo Gondeberto dos Santos, el Maringá, kiu nomis onklo ĉiun sian kunparolanton kaj donis ĉiam trafajn respondojn.

— Kun emocio la kongresanaro aŭskultis en la aŭditorio de "Rádio Sociedade da Bahia" la teatraĵon pri la vivo de Zamenhof, kiu antaŭ kelkaj tagoj jam estis elsendita de la

sama stacio, kiel prepara numero de la Kongreso. Ĝia fama ludistaro registrigis sur sonbendon la interesan verkaĵon.



Augusto Carlos, la denaska samideano

— Laŭ decido de la Kongreso la XVII-a Brazila Kongreso de Esperanto okazos en Porto Alegre, ĉefurbo de ŝtato Rio Grande do Sul. La dato estos difinita interkonsente de BEL kaj de la lokaj esperantistoj.

— La Prezidanto de BEL, D-ro Carlos Domingues, en la antaŭtago de sia foriro el Salvador invitis al vespermanĝo en Hotelo Bahia la estrarojn de la Organiza Komitato kaj de Associação Bahiana de Esperanto, kiujn li deziris honorigi kaj danki por la rimarkinda laborado.

MESAĜO DE PROF. PEDRO CALMON AL LA XVI.^a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

Grava Okazaĵo

Al la intelekta vivo de nia lando prezentas gravan okazaĵon la XVI-a Brazilia Kongreso de Esperanto, nun kunveninta en la antikva urbo Bahia. Nacia, antikva urbo, ni povas nomi Bahian, kunigante per kompletigaj kvalifikaj vortoj la gloron de ĝia antikveco kaj la honoron de ĝia kulturo.

Ni ne forgesu, ke tie ĉi aperis frue la brazila beletristiko; ĉi tie oni parolis kaj skribis unuafoje la puran portugalan idiomon de la majstroj de la Nacieco. Sed tiu sama karaktero de historia Ĉefurbo de la nacia penso devus stimuli ĝin por ĉiuj aŭdacoj de la spekulativa inteligenteco, por ĉiuj entreprenoj de kreaĵ spiritoj, por ĉiuj aventuroj de la civilizado signifoplena kaj plastika, revolucia kaj brila, el malsamaj rasoj, universala. Oni ne konjektu do, kontraŭdirecon pri tio, kio signifas tendencon al ĝenerala, enciklopedia, universa, en la plej vasta senco, kiun la humanismo ambicia kaj kuraĝa povu enteni.

Esperanto havas lokon inter la idealaj formoj de internacia repaĉigo: estas ja kompreneble, ke pri ĝi interesiĝu la elitoj: kutimiĝintaj vidi la Terajn panoramojn — aŭ eble, ĉar la rezulto estas simila je la facila domino de himeraj vojoj kaj de utopiaj perspektivoj. Sed (kaj estas en tio, ke la lingvo de la teoria Paco distingiĝas el la aliaj specoj de sociala profetaĵo) tiu espero pri unisona mondo basiĝus sur eksperimento de vorta interligo. Tio ne estas absurdo, tamen, rigore, interkonsento.

Kaj tiu mirindaĵo estas destinita por nuligi unu simbolon, elpensante alian. Ĝi forigas la Babelan Turon, favore al Harmonio de la rasoj, per interparolado de la popoloj!

Mondo sen limoj

Bele estas revii pri la ebrigiĝinta imago de iu mondo sen subjektivaj limoj, kiuj estas la limlinioj truditaj de nekomunikeblaj lingvoj malhel-pantaj la pacan movadon de la homoj. Ne temas, ni diru tuj de la komenco, pri substituo de la naciaj idiomoj, tiamaniere ilin detruante. Oni ne vundas je la koro vivantan lingvon, ne atinginte mortige la nacion, kiu per ĝi kantas, preĝas, krias, ploras. La idiomoj estas la substrato de la ŝtatoj; intima forto kaj flua kontinueco de la socio; instrumento kaj armilo de la defensivaj kulturoj; sango kaj energio de la imperioj, kies morala difektiĝo mon-trigas per la dirmaniera dekadenco, per la malvigla skribado, per la kripligoj, toleroj, malforto kaj per la diserigo de la literatura malkapabla, neniigita. Pere de ili okazas la konkeroj, la koloniigoj, ĉar troviĝas ĉiam iu idiomoprovokema kaj avida, kompare kun alia timema, sindetena, kies senkapablecon por kontraŭstaro karakterizas la degenero de ĝia vortaro — batita vojo por la sintaksa renversado, montranta la ŝanceladon de principoj, deviga sekvo de politika disruinigo. Tio estas komuna fakto en la tutmonda historio de la lingvoj, el kiu la popoloj fortikaj, maturaj, tiris la bonegan lecionon pri sia morala sendependeco, fiere defendita

per la sendependeco de la nacia lingvo. Pro tio, la lernejoj, la akademioj, la vortaroj fariĝis ĉie institucioj pri publika intereso, ĉe la linio pli riska al batalo de la regadoj kontraŭ la sennaciigoj. Pro tio, la grandaj ŝtatoj konsideris sin reale kultaj kaj firmegaj, nur kiam ili fiksis sian manieron korekte paroli, diri, skribi, ellabori sian gramatikon; kiam ili verkis sian poemon, donis siajn modelojn de ĉarma poeziaĵo kaj de bela elokventeco, tiel oferante literaturan esprimon de fortiĝo kaj personeco.

Ankoraŭ la natura kunligilo

Dank' al Dio, la portugala idiomo estas ankoraŭ la natura ligilo de la brazila unuiĝo, kaj en Bahia ĝi havas, kvazaŭ ĉe propra apartenaĵo, unu el siaj plej puraj kaj malnovaj seminarioj: la abunda, muzika lingvo de Vieira kaj Ruy. La popoloj, tamen, bezonis rimedon por la interkomunikado komprenebla kaj sincera. Same kiel floris iam la okcidenta latino, nun estas elpensita Esperanto, kiel fervora invito al kolokvo de fremduloj. Ne povus esti pli bela tiu iniciato, nek pli oportuna la provo detruigi la muregon de la malĝusttempa izoliteco, en la nomo de ĝenerala repacigo. De la tago kiam la homaro interkompreniĝis sen tio, ke la lingvoj vivaj malhelpus la penetradon de la kolektivoj en la interrilatojn de ideoj; de la tago kiam helpa lingvaĵo unuecigis la homojn en hipoteza interligo; de la tago kiam Esperanto forigis la zonlimojn malcedemajn, konstruante pontojn en lokoj kie ekzistis fosajoj; de la tago kiam la ege homarama revo de Lazaro Zamenhof (polo sampatrujano de Koperniko), fariĝis natura realaĵo — ekmalaperus la antaŭjuĝoj okazantaj la militojn, transformitajn

en kunrilatecojn, kiuj nuligas ĉi tiujn. Estiĝas la aŭroro, matena ruĝa krepusko: atmosfero de plaĉa simpatio ĉirkaŭvolvus la heredajn malmojn; kaj oni denove kunvenus por interparoladi pri la spontanea paco (precipe tiuj, kiuj konversacias) kaj ne plu pri la malamikemo, konstante surda kaj tradicia.

Plano disradiita en la nuboj

Oni ne diskutu, ĉu tio estos praktikebla. Grave estas antaŭe demandi, ĉu tio estas ebla, kaj ĉu tio estas dezirinda. La profundaj reformoj devenas, ne el la tuja respondo al allogo de genio, sed el la vidado kaj la antaŭvido, kiuj ĉi tiun karakterizas. La reformoj havas ĉiam la revolucion stampon de truda devigo kontraŭ la konformeco kaj pasiveco de la rutino. Ili reprezentas antecipadon — planon disradiitan en la nuboj.

Estas al tiu teoria, senfina vojo, ke ni levas la okulojn kaj deziras sukceson. Dio volu, ke ne ĝin forlasu, dum la anoncita marŝado, la fideluloj, la obstinuloj, la fidobenataj, tiuj kiuj plene kredas al la afero. Triumfu la kreskanta movado!

Kongreso de Esperanto povas aliformiĝi en asembleo forte idealista kaj humaneca, en akordo kun la deziregoj je la malfacila horo, kiun vivadas la nacioj.

Estas motivo de fiero por la bahianoj loĝantoj de Bahia ke tiu entrepreno okazu sub la bela ĉielo de mia naskolando, je la decidiga horo en kiu la civilizacio liberiĝas de tiom da vanaj teruroj, celante konfide la estontecon kaj la infiniton.

En ĉi tiu formulo de granda optimismo stariĝas la plej praktika el la konvencioj pri paco inter la homoj: la kora, inteligenta unuiĝo de Esperanto.

ZAMENHOF - JARO

SOLENOJ EN RIO DE JANEIRO

ESCOLA POLÔNIA

Ĉe la Lernejo Polônia, kiu funkcias en la antaŭurbo Magalhães Bastos, okazis memorigo pri la Zamenhof-Centjaro. La 25-an de novembro estas inaŭgurita la portreto de nia Majstro, oferdonajo de Brazila Esperanto-Ligo.

Ĉiuj ĉambroj de la Lernejo estas dediĉitaj al famaj polaj. Al L. L. Zamenhof oni juste elektis la Bibliotekon, al li dediĉitan (*Biblioteca Zamenhof*), kie staras lia portreto.




Foto farita okaze de la inaŭguro de la portreto de Zamenhof

Ĉeestis la ceremonion la Pola Ambasadoro Chabaniski kaj lia edzino, d-ro Carlos Domingues, prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo, prof. Alvaro Palmeira, reprezentanto de la Edukada Sekretario kaj nombraj geesperantistoj.

La direktorino de la Komunuma Lernejo, s-ino Fernanda Oliveira Carvalho, malfermis la kunvenon, faris paroladeton pri la okazaĵo kaj prezentis la gelernantojn, kiuj kantis

la Brazilan kaj la Polan Naciajn Himnojn. Poste, prof. J. B. de Mello e Souza, prezidanto de Brazila Klubo Esperanto, parolis pri Zamenhof (kiun li konis persone, okaze de la VI-a Universala Kongreso de Esperanto (1910), en Usono).

La gelernantoj ludis interesan programon de kanto, deklamo kaj folklora danco. Grupo da orfoj kaj orfinoj de Luma Restadejo kantis. Lernantinoj, kun tipe karakterizaj vestoj de kelkaj nacioj defilis en la salono kaj laste unu el ili, kies vesto havis la kolorojn de la Esperanta flago.

SOLENA KUNSIDO

Ĉe la salono de la Asocio de Komercoficistoj de Rio de Janeiro okazis en la 14-a de Decembro solena kunsido.

Prezidis la kunsidon Prof. Pedro Calmon, Rektoro de Brazila Universitato kaj ano de Brazila Beletristika Akademio. Laŭ invito de la Prezidanto eksidis sur la estrado la prezidantoj de Brazila Esperanto-Ligo, de Brazila Klubo-Esperanto, de Brazila Societo de Geografio kaj la Kultura Subsekretario de la Pola Legacio en Brazilo.

Prof. Pedro Calmon parolis pri la motivo de la kunsido, kaj invitis la verkiston Malba Tahan (prof. Julio Cesar de Melo e Souza) fari sian paroladon — “De Babelo ĝis Zamenhof”.

La ŝatata novelisto komencis citante la Biblian tekston de Genezo (ĉap. 11, par. 1): “Sur la tuta tero


estis unu lingvo kaj unu parolmaniero". Li komentis, laŭ plej kompetentaj ekzegezistoj, ties sencon, kaj ankaŭ tiun de la ok sekvantaj paragrafoj. Li montris, ke la Homaro uzadis nur unu idiomon, ĝis la Eternulo konfuzis tiun unikan lingvon de la tuta tero, pro la konstruo de la turo de Babelo, kies supro, kiel deziris la homidoj, devus atingi la ĉielon. Tial la Eternulo punis la popolon, kaj anstataŭ unu, aperis 72 lingvoj, kiel jesis la persa poeto Massudi. La afero, tamen, malĉesis, kaj nuntempe oni asertas, ke estas parolataj en la mondo 2850 idiomoj!

La jarmiloj pasas, kaj ni alvenas al la antikva civilizacio greka-romana. La Imperio, atinginta plenan apogeon, etendinte sian politikan ŝuperregadon al vastaj regionoj de Eŭropo, Azio kaj Afriko, ne sukcesis altrudi sian idiomon al tiom da venke submetitaj popoloj. Kontraŭe, malgraŭ sia supera vivforto, fakte la latina lingvo disdialektiĝis kaj naskis latinidajn lingvojn dum la Mezepoko, pligravigante la Eŭropan lingvan problemon. Okazis do al latino la samo kiel al la sanskrito kaj al aliaj antikvaj lingvoj parolataj de la Homaro. La malbeno Babela ankoraŭ daŭris.

Oni diras, ke iam la latino estis internacia lingvo. Ni konsentu pri tio, sed kun limigoj. En la oraj tempoj de la Patristiko la latino funkciis aŭ servis kvazaŭ internacia idiomon, sed nur por la elito de alta kulturo — universitataj profesoroj, verkistoj, scienculoj, ekleziuloj dum solenaj ceremonioj. Sed la lingvo de Kvintiliano defalis de siaj funkcioj, pro malkapablo daŭrigi tiajn praktikojn. La progresanta Scienco postulis de la intelektuloj la tempon kaj klopodon, kiujn ili tiam oferis por konkeri la arkaikan Ciceronan latinon, kun

ĝiaj deklinacioj, reguloj, apartaĵoj, idiosinkrazioj.

Ankoraŭ nun — kvankam tio ŝajnas nekredebla — oni proponas la reviviĝon de la antikva latino, por ke ĝi fariĝu internacia lingvo! Sed la veraj latinistoj malfavoras, kun bonaj argumentoj, la absurdan ideon. Ili scias, ke se estus modifita, simpligita, modernigita, detranĉita kaj pliampleksita por povi plenumi la proponitan taskon, la bedaŭrinda latino posedus ĉiujn neperfektaĵojn kaj neniun el la belaĵoj de la lingvo de Latio. Ĝi estus nerekoncibebla, teratologia idiomon. Pro amo al latino, ni lasu ĝin tia, kia ĝi estas. Monumento de la Antikveco, ĝi devas esti respektata.



Malba Tahan paroladas

Rakontas la kronikoj de la lasta kvarono de la XVI-a jarcento, ke la abatino de iu Burgonja monaĥinejo, kiu intermite akceptis religiulinon el pluraj landoj, havis grandan malfacilon ilin kompreni kaj esti de ili komprenita. Tiam ŝi havis la ideon organizi elektitan vortaron kaj komunuzan frazaron, por ke la novicinoj havu la eblon sufiĉe interkomunikiĝi, dum la lernado de la germana lingvo. Tio estis, kiel oni scias, la unua provo pri neŭtrala helpa lingvo, kies do Monahinestrino Hildegarda

estas la pionirino. La sekvoj de tiu provo transpasis la limojn de la monahinejo: presajo el nekonata aŭtoro aludis malfacilojn pro la plureco de lingvoj kaj la utilon de internacia idiomo. Oni konjektas, ke la provado de la respektinda abatino fariĝis konata de la aŭtoro de la interesa broŝureto, skribita en latina lingvo kaj disdonita al diversaj germanaj urboj. Certe (skribis Couturat et Leau, "Histoire de la Langue Universelle") la teksto de tiu publikaĵo impresis la pastron Mersenne, kiu rilatante amike al René Descartes, al ĉi tiu sendis ekzempleron de la presajo kaj demandis, ĉu tia afero estus plenumbla.

Jen kial kaj kiel la glora filozofo verkis la faman leteron al Pastro Mersenne, datitan de la 20-a de Novembro 1629. Descartes opiniis tiun ideon ebla, kondiĉe ke oni obeu kelkajn esencajn normojn; el ili: simpla gramatiko (malmultaj reguloj); fonetiko (al la sama litero, la sama sono); internacieco de la vortoj.

La verketo de Descartes vekis la scivolemon de studemuloj kaj provoj ekaperas: kleraj homoj, Leibniz la unua, studas profunde la problemon kaj sugestas solvojn. Estiĝas komence la pazigrafioj, filozofiaj lingvoj, per komunaj skribaj signoj; senutilaj, ĉar ili ne sekvis la karteziianajn principojn.

La oratoro mencias kaj kritikis supraĵe plurajn projektojn de vanaj lingvoj aperintaj kaj rapide mortintaj, inkluzive la faman muzikan lingvon "Solresol", de François Sudre (Paris, 1866). Nur unu rezistis kelkan tempon, gajnis multajn adeptojn, sed poste brue frakasis: Volapük, de Johann Martin Schleyer. Ĝi havis la aŭdaccan devizon — "Menade bal, puki bal": unu homaro, unu lingvo.

Sed, ve! la volapükistoj ne interkompreniĝis, kiam ili kunvenis.

La diverseco de lingvoj estas nesolvebla problemo. Necesas, ne unu sola universala lingvo, sed neŭtrala, helpa, internacia idiomo, kiel la verko de D-ro Zamenhof. La oratoro klarigas, ke li ne bezonas fari la apologion de la lingvo Esperanto, tial ke la ĉeestantoj konsistas el esperantistoj kaj el amikoj de Esperanto. Anstataŭ tia nenecesa tasko, li nur mencias la precipajn fakojn de la propagando, ĝiajn sukcesojn kaj malsukcesojn. Li ankaŭ rememoras pitoreskajn epizodojn cititajn en la libro "Post War Europe" (Postmilita Eŭropo) de H. Jackson, kiuj montras evidente la mankon de internacia lingvo al viroj bezonantaj urĝe kompreniĝi por decidi gravajn problemojn estigitajn de la granda milito. Li citas la aferon pri la "Big Four" — Granda Kvaro — (Clemenceau, Lloyd George, Wilson kaj Orlando), kiu konferencis nur kun la helpo de du aŭ tri interpretistoj. Sed ĉi tiuj ofte tradukis nekontentige la deklarojn de la eminentaj politikistoj, kio okazigis incidentojn kaj reĝustigojn. Same okazis, kiam Chamberlain konferencis kun Hitler, kaj Churchill kun Stalin. El la interpretistoj dependis, multfoje, la decido de aferoj, kiuj tion interesis la vivon de de tutaj nacioj!

Rimarkigas la oratoro la gravecon kaj belecon de la Zamenhofsaritaĵo, se oni konsideras, ĉu ĝiajn praktikajn celojn, ĉu ĝian sencon humanan kaj filozofian.

Sed ne forgesu la samideanoj, ke se oni jam multon prosperis atingi, restas ankoraŭ multon por realigi. La grandaj ŝanĝoj, reformoj, plibonigoj de la civilizacio ĉiam trovis obstinajn, persistemajn kontraŭulojn. La oratoro citas la Kristanismanon, la

eltrovon de Ameriko, la aserton de Galileo, la konstruon de la unuaj fervojoj, la decimalan metran sistemon k. a. . .

La movado esperantista havas ankoraŭ kontraŭulojn; unuj batalas kontraŭ ĝi, aliaj preferas resti indiferentaj. Sed la idealo ne senfortiĝas kaj la triumfo baldaŭ venos.

Esperanto elaĉetas la homaron el la Babela malbeno. Babelo estis puno; Esperanto valoras forton, komforton, noblan esperon.

La oratoro estis multe, longe aplaŭdita de la aŭdantaro.

Poste la Rektoro Pedro Calmon dankis la ĉeestantojn, gratulis la esperantistaron pro la brilo de la memoriga Zamenhofa jarcento. Li atentigis la ĉeestantojn ke inter ili estas la veterano D-ro Leonel Gonzaga, unu el la aŭtoroj de la unua Gramatiko de Esperanto publikigita en Brazilo (1906). Kaj li faris sincerajn bondezirojn por felĉa rezultato de la laboro farita de la brazilaj esperantistoj profite de ilia idealo.

ARTFESTO HONORE AL ZAMENHOF

Okazis en la 25-a de decembro en la Nacia Muziklernejo impona festo honore al la 100-jara datreveno de la naskiĝo de L. L. Zamenhof.

La festo, kiu konsistis el deklamado, kantado kaj pianludado estis dividita en du partoj: en la unua S-rino Yara Coelho pianludis verkojn de Martini, Schumann, Maria Bird kaj José Vieira Brandão; S-inoj Lubélia Brandão kaj Maria Aparecida França prezentis dupiane verkojn de Debussy, Chabrier, Philipp, Nadja Jabor kaj Saint-Saëns.

En la dua parto soprano Mirtes Matte kantis de Puccini, *Plendon de Tosca* (Vissi d' arte) de la Opero

Tosca; Sônia Gomes de Mattos deklamis la poeziaĵojn "*Kuŝas Somero*" kaj "Ho, Mia Kor'!", la unua de Heine, tradukita de Zamenhof kaj la dua, originale verkita de Zamenhof; Regina Lúcia Pimentel, "Preĝo sub la Verda Standardo" de Z. kaj Prof-ino Maria Sabina en traduko de J. B. Mello e Souza, "Kanto de Amo" de ŝia aŭtoreco. Kaj fine "Louvoro a Zamenhof", de Murilo Araújo, estis deklamita de Lúcia Regina de Lucena. Ĉiuj partoprenantoj en la programo brile sin montris kaj ricevis multajn aplaŭdojn. Kiel memorigaĵo pri ŝia grandvalora kunlaboro ili ricevos la libron "Zamenhof-Iniciador do Esperanto, per kiu BEL



Yara Coelho



Myrtes Landi Matte

honorigas la centjaron de la aŭtoro de la Internacia Lingvo.

En la fermo de la festo Prof. J. B. Mello e Souza dankis al Prof-ino Maria Sabina, al poeto Murilo Araújo kaj al ĉiuj, kiuj kontribuis al la plena sukceso de la soleno.

SALUTPAROLADO DE LA MINISTRO DE EDUKADÒ KAJ KULTURO

En la 15-a de Decembro Prof. Clóvis Salgado, Ministro de Edukado kaj Kulturo, faris en la oficiala programo "La Voĉo de Brazilo", je la 19.30, belan salutparoladon al Zamenhof kaj al la esperantistoj. Tiu grava programo, disaŭdigata de ĉiuj centoj da radiŝtacioj en Brazilo senescepte, estis aŭskultata tra la tuta lando. La traduko de la parolado, per kiu Prof. Clóvis Salgado volis honorigi la daton, aperas en ĉi tiu numero de nia gazeto kiel ĉefar-

tikolo. Tiu amika saluto bonege impresis pro la sincereco kaj pro la vera simpatio esprimata al nia afero.

La Prezidanto de B.E.L. manifestis al S-ro Ministro la varman dankon de la esperantistoj por liaj afablaj vortoj.

MEMORIGA POSTMARKO

La Ministro de Trafiko kaj Publikaj Laboroj, Admiralo Ernani do Amaral Peixoto, favore decidis la peticion de B.E.L. por la eldono de speciala poŝtmarko memoriga de la Centjaro de Zamenhof. La desegno de la poŝtmarko estis farita de konata fakulo, S-ro Cesare Gandini, kaj montras belan portreton de Zamenhof. La Filatela Komitato de la Departamento de Poŝtoj kaj Telegrafoj, kiu estis konsultita, aprobis la desegnon. Nun la Monfarejo presas la poŝtmarkon, kiu estos verda laŭ la koloro de Esperanto. Ĝia valoro estos Cr\$ 6,50, tre utila por la korespondado kun alilando.


Tiu estos la sepa poŝtmarko rilata al Esperanto, kiun eldonas la brazila Registaro. La eldonnumero estos 6.000.000, multe pli granda ol la antaŭaj eldonoj.

"ZAMENHOF — INICIADOR DO ESPERANTO"

La kortuŝa biografio verkita de la ŝatata argentina verkisto A. Lopez Luna sub la titolo "Zamenhof — Iniciatinto de Esperanto", estos eldonita de la konata firmo Fratoj Pongetti, kiu distingiĝas pro siaj altnivelaj libroj. Tradukis la verkon alia verkisto — Carlos Domingues, kiu cetere estas la Prezidanto de B.E.L. La verko estos disvendata per la vendoreto de la eldonistoj tra la tuta Brazilo, kio certigas plej vastan

diskonigon de la vivo de Zamenhof en neesperantistaj medioj.

Ĉiuj niaj Membroj Subtenantoj ricevos donacon de tiu alloga libro kun dediĉo de la tradukinto.



Afiŝo sur fasado de la Nacia Lernejo de Muziko por la artvespero.

ZAMENHOF-MONUMENTO

Ankaŭ la metropolo Rio de Janeiro havos sian monumenton al D-ro Zamenhof. La Departamento de Parkoj kaj Ĝardenoj, per sia Direktorino la Inĝenierino Elza Pinho Osborne, donis favoran juĝopinion ne nur al la petskribo de B.E.L. sed al la projekto de la Inĝenierino Ligia Fernandes, laŭ kiu tute moderna monumento estos strarigita sur ĉarma placo ĉe la komenco de Marbordo Botafogo.

La placo kun la monumento ricevos la nomon "Esperanto".

Dum la monato Decembro Rádio Ministério da Educação e Cultura

kaj Rádio Roquette Pinto dissendis programojn speciale dediĉitajn al la Centjaro de Zamenhof, sub la aŭspicioj de Brazilia Esperanto-Ligo kaj Brazilia Klubo "Esperanto".

BIBLIOTEKO

En la sama monato la Biblioteko de B.E.L. la plej riĉa esperantista kolekto de Ameriko, estis malfermita al publika vizitado.

TAGMANĜO

La kutima tagmanĝo de B.K.E. okazis en la 26-a de Decembro kun multaj partoprenantoj kiel parto de la memorigaj festoj.

EL PROVERBARO ESPERANTA

De L. L. Zamenhof

Petro kornojn tenas, Paŭlo lakton prenas.

Hodiaŭ supre, morgaŭ malsupre.

Li estas preskaŭ mia frato; nepo de kuzo de onklo de konato.

Ŝiru vin en du partoj, la mondo trian postulos.

Se ĉiu balaos antaŭ sia pordo, tiam en la tuta urbo estos ordo.

Ne juĝu pri afero laŭ ĝia ekstero.

Ne ĉion oni devas severe ekzameni.

Iafoje oni devas okulon fermeti.

Pri propra afero neniu juĝas libere.

Vivo glate ne fluas, ĉiam batas kaj skuas.

Ne bedaŭru hieraŭan, ne atendu morgaŭan, ne forlasu hodiaŭan.

Kaldrono ridas pri potoj kaj mem estas kota.

Bona famo sin trenas testude, malbona kuras rapide.

Truon de l'honoro flikos neniu tajloro.

Faru vian aferon, Dio zorgos ceteron.

BRAZILA KLUBO "ESPERANTO"

FONDITA EN LA 29-a DE JUNIO 1906

SIDEJO: PRAÇA DA REPÚBLICA, 54-1.º ANDAR — RIO DE JANEIRO —
TEL.: 42-4357 — MALFERMITA EN LA LABORTAGOJ DE LA 8-a ĜIS LA
18-a. KUNVENOJ: SABATE DE LA 14-a ĜIS LA 18-a

Kursoj: Komenciĝis la 17-a de Jan. 59 Elementa Kurso de E. sub la gvidado de d-ro Floriano Pessoa, laŭ "Curso de Esperanto em 20 Lições" de C. Fernandes e M. Mendes. Por la posedantoj de elementa diplomo Prof. Henerik Kocher komencis la 7-an de Marto Superan Kurson.

Lekcioj: De la 25-a de Ap. la klubanoj havas la plezuron aŭdi prof.-on Porto Carreiro Neto, ĝen. sek. de B.E.L. kaj akademiano, kiu instruas pri altnivelaj gramatikaj temoj podusabate ĉiumonate. La lekcioj tre utilas por la kandidatoj al Profesora Diplomo kaj ĝenerale interesas ĉiujn studemajn esperantistojn.

53-a Datreveno de B.K.E. Por festi la 53-an datrevenon de B.E.K. oni okazigis tagmanĝon la 4-an de Julio en la restoracio de Clube Militar. Pri la dato parolis Prof. J. B. Melo e Souza, prezidanto de la klubo kaj D-ro Floriano Pessoa legis la raporton pri la antaŭa manĝo. F-ino Lila Teixeira estis aklamita kiel raportontino.

Portreto de D-ro Carlos Domingues. En la sama tago dum la kutima sabata kunveno ricevis diplomojn la aprobitoj en la Supera Ekzameno farita en Novembro de la pasinta jaro. La diplomitoj dezirante honorisian profesoron D-ro Carlos Domingues, donacis al B.E.L. lian portreton, kun belega kadro egala al tiuj de la du antaŭaj prezidantoj de tiu institucio. Tiel estis kompletigita la ga-

lerio de portretoj de la prezidantoj de B.E.L.

La nomojn de la diplomitoj oni trovas sur la lasta paĝo de la numero Jan.-Marto de B.E. Unu el ili, S-ro Luiz Alberto Martins, okaze de la solena inaŭguro de la portreto, salutis la omaĝaton per la jena parolado:

Sinjorinoj kaj Sinjoroj!

Nia kara D-ro Carlos Domingues!

Antaŭ ĉirkaŭ kvar jaroj mi faris mian Elementan Kurson de Esperanto. Ekde tiu tempo via bonfamo jam atingis miajn orelojn. Via inteligenteco kaj kulturo estis amplekse komentariitaj kun admiro.

Iam mi eksciis, ke vi konas la portugalan lingvon. En tiu tempo mi estis simpla jura studento, kiu ĵus enskribiĝis en la Fakultato. Mi havis sub miaj manoj la tutan serion da libroj, kiujn mi tra legis dum la poreniraj ekzamenoj.

Mi provis elprovi vin. Zorge mi traserĉadis embarasajn problemojn de la portugala lingvo. Kaj ĉiam por mia miro, viaj respondoj estis donitaj kviete, kun simpleco kaj koncizeco, kvazaŭ mi demandus kiom faras du plus du. Min mirigis la fakto, ke plejmultfoje viaj klarigoj estis pli klaraj ol tiuj donitaj en la libro.

Iam mi sciis, ke vi ekzamenadis la kandidatojn al Instituto Rio Branco. Mi scias, ke tie la portugallingvaj ekzamenoj estas tre malfacilaj, kaj postulas de la kandidato

largajn konojn pri la lernobjekto. Kaj mi tuj ekpensis:

kiom devas scii la ekzamenanto?... De tiu tempo mi rigardis vin kiel "vivantan gramatikon".

Sed iafoje mi devis ŝanĝi mian ideon, ĉar viaj profundaj konoj ne estis limigitaj nur al la portugala lingvo, sed tuŝis ankaŭ la lingvojn germanan, francan, hispanan, anglan kaj latinan, la juron, la historion, la kontosciencon kaj mi ne scias kion plu... Mi ekrigardis vin kiel "vivantan enciklopedion".

Sed estis kiel prezidanton de B. E. L., ke mi admiris vin, ĉar tre malmultaj estus gvidintaj ĝin tiel majstre, spite la mankon de homa materialo, la nekomprenon de multaj, la egoismon de kelkaj kaj la envidion de aliaj. Egocentrismo kvazaŭmania faras ilin forgesi, ke Brazila Esperanto-Ligo reprezentas Brazilon, tio estas, veran nacion, kaj ne ian ajn duondekduon da ili. Kaj, sen Brazila Esperanto-Ligo — aŭ pli klare dirite — *sen vi* ne estas Esperanto en Brazilo.

Pro via granda modesteco vi certe ne konsentos mian aserton dirante, ke vi havas tre kapablajn samlaborulojn. Tion mi konsentas. Kaj mi klinas min antaŭ ilia sindonemo. Sed, ne forgesu, nia kara D-ro Carlos, ke ni konsistigas korpon, el kiu vi estas la kapo, la cerbo... Fortranĉu la kapon de korpo kaj vidu tion, kio okazas: ĝi mortas, pereas...

Tre malmultaj havus la paciencon sin teni tiel serene en tiu komplikajo, tio estas, la esperanta movado en Brazilo, kie multaj helpas, kvankam malhelpante. Ili deziras la gloron, sed ne la laboron... Dume, vi estas la faranto de multaj treege gravaj laboroj, kaj ne krias publike viajn faritajojn.

Kiom da fojoj vi projektas planojn, kiuj, se ili estas realigitaj antaŭenpuŝos la Brazilan Esperanto-Movadon, antaŭenjetante la nomon de nia patrujo en la mondon! Sed jen la egoistoj, kontraŭstaras vin, malhelpante viajn paŝojn. Ili scias paroli pri kunfratiĝo, idealismo, k.t.p., sed ili tute forgesas ellerni la internacian lingvon. Kaj venas al mi la skeptikaj paroloj de D-ro Kabe, kiam iam li diris:

"Antaŭ la kunfratiĝo oni devas ellerni Esperanton."

Kiom da ĵusbakitaj esperantistoj eniris en Brazilan Esperanto-Ligon prezentante kiel novajn, planojn jam de longe de vi konatajn, kiuj iam frakasis! Vi ilin akceptas kun brakoj malfermitaj dirante: eble ni profitos vian planon. Kiam, post iom da tempo, ili foriras lasinte la laboron duone faritan, estas vi, kiu ĝin finos, sed vi neniam diras ion ajn nebonan pri la forestantoj. Vi nur daŭre laboras.

Jes, via diplomatio ne havas limojn. Itamarati antaŭ vi estas malsana birdeto.

Mia kara Profesoro!

Mi ĉiam rigardis Esperanton kiel lingvon, kiun oni devas legi, skribi, noti la plej bonajn esprimojn, fine ellerni ĝin kiel la aliajn lingvojn. Sed mi ĉiam agis blinde. Mankis al mi direktado, plano por pli bone studi.

Kiam en la komenco de la pasinta jaro mi eksciis, ke vi gvidos Superan Kurson mi eksaltis de ĝojo.

Aliafoje vi vin montris supera. Meze de ĉiuj malfacilaĵoj, de ĉiuj batoj de la sorto, de ĉiuj priokupiĝoj, de ĉiuj malhelpaĵoj, de ĉiuj amasoj da laboroj vi prenis sur vin la taskon gvidi la Superan Kurson de Esperanto kiun ni partoprenis. Dum pli

(Daŭrigo sur pago 24)



LA MISTERO ROMANO

*Afrânio Peixoto, Coelho Neto, Me-
deiros e Albuquerque, Viriato Correia*

XXXVII

MI KONFESAS!

Enirinte hejmen en tiu nokto, li ne ŝlosis la pordon. Li iris al la fenestro kaj larĝe malfermis ĝin. Estis varmege.

Li demetis la jaketon kaj sin apogis dorse sur duonrompitan sofona ĉe angulo de la ĉambro. Li intencis iom ripozi por sin bani poste. Kun tiu varmo li certe ne povus dormi. Li ekflamigis kandelon apud la sofo, malfermis la vesperjurnalojn kaj eklegis ilin. Neniu novaĵo. La intereso pri la morto de Sanches Lobo jam estis malaperinta pro la aresto de la supozita murdinto. La ĵurnaloj, kiuj antaŭ kelkaj tagoj publikigis kolonojn plenajn de hipotezoj kaj policaj esploroj nun aperigis nur maloftajn notojn. Nun oni parolis nur pri la memmortigo de Melo Bandeira. La raportistojn iel ankoraŭ priokupis nur la malapero de la testamento de la bankiero: la polico sukcesis nek klarigi la malaperon nek trovi la ŝtelinton. Eĉ tiu intereso jam estis malaperinta.

Albergaria metis la ĵurnalon kontraŭ sia brusto kaj cerbumis kiu estas la ŝtelinto de la testamento? Kiun povus interesi ĝia malapero. Ĉu la kuracisto de la ŝtata Unua Helpejo? Tio tamen ne ricevis konfirmon de la persono de kiu la testamento estis forprenita. Sed... kiu parenceco ekzistis inter la kuracisto kaj la bankiero? Li pasigis sian tutan vivon studante tion de Sanches Lobo

kaj neniam trovis aludon al tiu parenceco. Sendube io ekzistis. En la taglibro mem de Sanches Lobo, publikigita de la polico la bankiero nomis la kuraciston sia nevo. Nevo, kiel? Nevo, kial?

La vivo de Sanches Lobo estis multe pli komplika, multe pli nebuleca ol li imagis.

Kaj li pensis, pensis, pensis...

Li aŭdis ĉirkaŭ la domo brueton de paŝoj, kiuj alproksimiĝis. Pro malagemo li ne leviĝis. Estas nenio. Post kelkaj minutoj en la ekstero pasis ombro kvazaŭ ĝi volus sin kaŝi sub la apogilo de la fenestro. Albergaria volis stariĝi, sed iu montriĝis antaŭ la fenestro kaj parolis en la domon.

— Ne ĝenu vin. Restu, kie vi estas.

Li ekstremis. Ŝajnis al li, ke li jam estis aŭdinta ie tiun voĉon.

Kaj kun premata voĉo li demandis:

— Kiu estas?

La pordo malfermiĝis kaj du homoj eniris en la ĉambron. Albergaria levis la kandelon pli alten ol liaj okuloj sed la kandelo falis el liaj manoj kaj la lumo estingiĝis. La du homoj estis la delegitoj Lobato kaj Eneas Cabral.

— Ne ĝenu vin; restu, kie vi estas. Ni mem ekflamigos la kandelon, diris Eneas.

Kaj li ekflamigis ĝin. En la ĉambro estis du malnovaj seĝoj. Eneas portis ilin apud la sofona. Ambaŭ sidigis. Dum kelkaj sekundoj oni silentis. La unua helpa delegito alĝustigante la nazumon diris iom emociita:

— Eble nia vizito al via domo mirigas vin, ĉu ne?

— Iel, respondis Albergaria.

Ĝi estas pro la granda simpatio, kiun ni havas por vi. Ne miru pri la

frazo. Ni venis ĉi tien por ke vi ne donu al vi la penon iri al ni.

— Kion vi deziras de mi ?

— Vi scias pli bone ol ni.

Albergaria ludis la naivulon.

— Jen bonega historio! Vi venas al mim kaj mi devas scii, kion vi volas!

— Ni volas, ke vi faru tion, kion vi baldaŭ devos fari, diris Lobato.

— Konigu vian penson! ekdiris Albergaria.

Ĉar vi ne amas cirkaŭfrazon, interrompis Eneas, ni parolos klare. Ni volas vian konfeson. Estas senu-tile nei, ke vi estas la murdinto de Sanches Lobo.

Albergaria prenis justan pozicion sur la sofo.

— Kial vi diras tion al mi ?

La delegito respondis.

— Ĉar la Polico havas ĉiujn elementojn por indiki la krimulon. Ĝi konas ĉiujn liajn paŝojn, antaŭ kaj post la krimo. Ĝi scias, ke la krimulo planis la krimon dum multaj jaroj. Ĝi konas ĉiujn liajn zorgojn kaj singardojn por ne postlasi signojn: la tenisaj ŝuoj, kiujn li piedvestis por kaŝi la grandon de la piedoj, la kotonaj gantoj, uzitaj por forigi la fingrmarkojn kaj la loko, kie li ĵetis for la suojn kaj la gantojn. Ĝi scias plie: pri la loko, kie li enterigis la monon, la lutita skatolo en kiu ĝi gardis la monon, pri la akvo ĵetita sur la volvitan grundon por malaperigi la postsignon. Kaj ankoraŭ pri la ekzakta horo kiam la krimo estis plenumita kaj pri la kurioza cirkonstanco, ke la horloĝo estis ĝustigita je la 11-a, dum la murdo estis farita jam de du horoj.

Ĉu vi ne pensas, ke ne valoras la penon plu nei ?

Albergaria estis miregigita. Ne-niun vorton li povis diri.

— Respondu! insistis Eneas Cabral. Estas pli bone konfesi, ĉar vi ne povas plu nei.

Albergaria longe pensis.

La du aŭtoritatuloj ne sin movis, kvazaŭ ili ne volis embarasi eĉ unu solan el liaj agitataj pensoj.

Post longa tempo la murdinto abrupte moviĝis.

— Ĝi estas vero!

— Ĉu vi do konfesas ? demandis la unua delegito kun ĝojega mieno.

— Mi konfesas!

— Nun ni devas akompani vin al la Policejo.

Kaj alproksimiĝinte al la fenestro li vokis la policistojn. Pluraj el ili ekaperis.

Albergaria stariĝis, kaj protestis.

— Ne estas necese. Mi iros kun vi du.

Eneas Cabral laŭŝajne meditis dum momento kaj diris poste:

— Tio estas nia devo. Ĝi estas laŭ la regularo. Temas ne nur pri murdinto sed ankaŭ pri danĝera rabisto.

Albergaria staris, indignigite.

— Temas pri murdinto kaj ne pri rabisto.

La du aŭtoritatuloj rigardis lin. Eneas Cabral diris:

— Ĉu ne estas rabisto tiu, kiu forprenis pli ol ducent milrejsojn ?

— Mi ŝtelis multe malpli ol tiu, kiun oni ŝtelis al mi. Tio estas familia afero.

— Afero, kiun oni ne povas esplori ĉi tien, diris Lobato, sed nur en la proceso.

Ĉe gesto de la aŭtoritatuloj la policistoj eniris en la ĉambron.

— Kaj la mono ? diris Eneas. Mi ne eliros el ĉi tie ne kunportante la ŝtelistan monon.

— Ĝi estas vero, aldiris Lobato.

— Kaj sin turnante al Albergaria, li ordonis:

— Iru kaj montru al ni, kie vi gardis la monon.

— Mi ĵetis ĝin en la maron, respondis la krimulo.

— Vi certe serĉas.

— Ĝi estas la vero.

— Sed la Polico scias, ke la mono estis alportita ĉi tien kaj ĉi tien enterigita.

— Enterigita apud la krano en la korto, rimarkigis Eneas.

— Ĉar la Polico scias tion, ĝi serĉu kaj elterigu ĝin, interrompis Albergaria.

— Mi vidas, ke vi, rediris la unua delegito, ne volas esti bona kamarado. Tridek ok, sepdek du! vokis la policisto, iru, kaj fosu apud la krano en la korto.

La laboro daŭris dek kvin minutojn. La skatolo ne estis trovita.

La delegitoj maltrankviligis. Ili mem komencis serĉesplori la angulojn de la domo. Meblaro, truoj, anguloj estis esploritaj. Alberg'aria eksaltis. Kiam Eneas, sur kestege de petrolo, ekesploris la murojn de la kuirejo, tremfrosto trakuris lian korpon.

— Tie ĉi estas kavaĵo, diris la policano al la kunuloj. Supreniru, Tridek ok, ĉar vi estas pli alta kaj metu la manon en la internon.

En tiu momento Albergaria eksplodis. Li liberiĝis sin sovaĝe de la policistoj, kiuj tenis lin kaj sin ĵetis kiel sangsoifa besto sur Tridek ok. Oni volis reteni lin. Neniu sukcesis. Li kaptis la policiston per la kruroj kaj renversis lin. Lobato forkuris. Prenante malnovan tranĉilon, kiu estis sur la forno, Albergaria antaŭeniris kontraŭ Eneas. Sed en tiu

momento iu policisto tenis lin forte de malantaŭe. Li volis sin turni. Li ne povis. Li volis krii, mordi, krurbarakti. Neeble.

Kaj li kaj la policisto falis teren.

Albergaria vekigis. Li estis fallinta el la kaduka sofo surteren. La ĉambro estis malplena. Ekstere la nokto estis hela kaj plena de steloj.

Kia malbeninda sonĝo! Kia terura inkubo!

Li iris al la fenestro rigardi. Neniu. Li trairis la domon, suspekteme. Nenio. Li iris al la kavaĵo, kie li kaŝis la skatolon kun la mono. Ĝi kuŝis netuŝita. En la buŝo li sentis amaran guston. Kio faris malsana lian stomakon? Ĉu la fazeolkuirajo de la matenmanĝo?

Viriato Correia

Tradukis Y.

(Daŭrigo de paĝo 21)

ol unu jaro ni, viaj ekslernantoj de la Supera Kurso, sed viaj ĉiamaj lernantoj de Esperanto, ricevis de vi neforgeseblajn lecionojn, plenajn de scio, de kulturo...

Pro ĉio, kion vi donis al ni, nia kara D-ro Carlos Domingues, pro via sindona laboro al la Esperanto-movado en Brazilo, ni deziras en tiu momento elmontri niajn eternajn korajn dankojn, kaj perè de tiu ĉi memoraĵo envicigi vin en la galerion de la eminentaj brazilaj esperantistoj: haltu la horloĝo de la tempo: de nun vi estas *nemortema!*

En la plej proksima numero aperos la danko de D-ro Carlos Domingues.

BRAZILA KRONIKO

grupon, de li fonditan en la jaro 1953, kaj jam de kelka tempoj tute silentan.

RIO GRANDE DO NORTE

Natal — Nova elektita estraro de Associação Potiguar de Esperanto: Honora Prezidanto — Deputito Djalma Maranhão; Prez. Raimundo F. Gurgel; Gen. sek. Leonel F. Oliveira; 1-a sek. Arlindo Castor de Lima; 2-a sek. Aldemar Sá Leitão; Kas. Pedro P. de Souza; Bibl. F-ino Alzenir F. de Souza; Dir. Depart. Publ. Ril. D-ro Paulo Gomes da Costa.

Okaze de la kunveno por la solena enoficigo, oni disdonis, en la nomo de Brazila Esperanto-Ligo, la diplomojn al la lernintoj aprobitaj en la elementa E.-kurso D-ro Zamenhof, de Senac. Poste, nia samideano d-ro Antônio Gentil Fernandes faris aplaŭditan paroladon pri la Majstro Zamenhof. Prezidis la solenon la supera juĝisto João Vicente da Costa kaj d-ro Oto de Brito Guerra, direktoro de la Jura Fakultato de Natal.

BAHIA

Feira de Santana — La 17-an de Oktobro 1959 enoficiĝis la estraro de la nova organizita "Urbo Princino Esperanta Klubo": Prez. Benedito Figueiredo Farias; Vicprez. Josemita Nery Boaventura; 1-a sek. Maria José Costa; 2-a sek. Ursulina Oliveira; 1-a kas. Lindaura Costa; 2-a kas. Hildeth Silva Santos; Oratoro — Arlindo Reis; Kurs-dir. Josemita N. Boaventura; Bibl. Lícia Santos; Sport-dir. Clara Santos; Festa Komis. Cleonice Ramos.

Ilhéus — Nova elementa E.-kurso nun estis starigita ĉe Ilhéus Esperanta Grupo, dank' al klopodoj de nia samideano Eléus Leonardo de Sá, kiu tial komencis revigligi tiun

SÃO PAULO

São Paulo — La aŭgusta programo de la Kinejo Maracanã anoncas trimonatan Esperanto-kurson, senpagan, ĉe la Lernejo 3 de Majo.

Ourinhos — Sociedade Espirita Fraternidade inaŭguris E.-kurson je la 23-a de septembro. 24 gelernantoj sekvas ĝin, ĉiudimanĉe (16-17 h.)

PARANÁ

Curitiba — Nia samideano Leônidas Silva sciigas nin pri E.-kunvenoj, ĉiudimanĉe, ĉe la sidejo de Paraná Esperanto-Asocio. Funkcias E.-kursoj ĉe la ŝtata Gimnazio. Sociedade Teosófica, P. E. A kaj L.B.V.

Floresta — En ĉi tiu urbeto, de la Komunumo Maringá, estas fondita, la 8-an de novembro pasinta, E. klubo — "Clube Esperantista Floresta" (strato 7 de Setembro). Prezidanto — Perácio J. Monteiro; sek. Honório Nishide. "Informilo" estas monata publikaĵo de Paraná Esperanto-Asocio, kaj donas sciigojn pri la Esperanta movado en la ŝtato: en Curitiba (Zamenhofa festo ĉe la Publika Biblioteko; gvidis la kunvenon nia pioniro en Paraná, Augusto de Castro), en Paranavai, en Londrina (parolado pri Zamenhof kaj Esperanto, de José Pauluk ĉe Lions-Klubo), ankaŭ en Mandaguari, Ponta Grossa, Floresta, k.a.

RIO GRANDE DO SUL

Soledade — La ĉefurbestro, per la dekreto n-ro 125 de 1959, donis al unu el la stratoj de tiu urbo la nomon — *Rua Esperanto*.

MINAS GERAIS

Monte Santo — Nia samideano Frato Severiano de Souza ĉe la "Seminário Sacramentino" starigis Seminarian Esperantistan Movadon (SEMO), kaj gvidis kursojn, tiel ke la Seminario kalkulas jam kun 25 esperantistoj. SEMO organizis en Septembro Esperantan festeton kun kantoj, deklamado, poeziaĵoj kaj paroladetoj pri la celo de nia movado kaj de Esperanto en la mondo, kaj komencis eldoni la organon SEMO, kies unua n-ro (okt. nov. decembro) havas bonan legaĵon.

Ponte Nova — Pastro Roque dos Santos donis bonajn sciigojn pri la propagando kaj disvastigo de Esperanto en tiu urbo kaj ĉirkaŭaj urboj. Rádio Sociedade de Ponte Nova meritas nian gratulon pro sia bonega laboro, disradiante informojn kaj lecionojn pri Esperanto (785 kilocikloj, je la 12-a h. marde, jaŭde, sabate). Patro Roque aŭguras bonajn sciigojn pri la Esperanta movado en Ponte Nova, Abre Campo, Dom Silvério, Jequeri, Urucânia, k.a.

Ubá — Omaĝe al la jarcenta datreveno de la Zamenhofa jarcento, la 15-an de decembro okazis ĉe la salono de Ubá Tenis Clube brila kunveno. Prezidis ĝin d-ro Newton Carneiro.

S-ro José Gomes Braga faris paroladon, kaj poste parolis Edina Reis, Irthes L. de Andrade kaj Leocádia G. Siqueira. La dua parto konsistis el omaĝo de la horsocieto al nia Majstro, salutoj, deklamado de poeziaĵoj, himno La Espero.

Estas fondita en ĉi tiu urbo "Esperanto-Klubo João Ernesto", kiu filiiĝis senprokraste al Brazila Es-

peranto-Ligo, kaj kies Statuto jam estas aprobita de la Ligo.

Estas ĝia prezidanto nia sindona malnova samideano José Gomes Braga, delegito de U.E.A., kaj sekretario Edina de Barros Reis.

Edina Reis estas fervora esperantistino. Ŝi serĉas konigi nian lingvon al siaj samurbanoj, gvidante Esperanto-kursojn ĉe sia propra laborejo. Kiam nokte, je la sepa horo, estas fermitaj la pordoj de ŝia apoteke, ĉi tiu aliformiĝas en Esperantan lernejon. Krom medikamentoj, pesiloj, peziloj, k.c., ankaŭ staras tie nigra tabulo sur kiu ŝi donas klarigojn al la komencantoj pri la lecionoj de la "Curso de Esperanto em 20 lições, de Couto Fernandes", la lernolibro kiun ŝi adoptas, laŭ ŝi deklaris. Belega ekzemplo!

Uberaba — Ekde la 13-a de septembro 1959 estas starigita en tiu ĉi urbo "Uberaba Esperanta Klubo", kies statuto estas jam aprobita de Brazila Esperanto-Ligo. Jen ĝia unua estraro: Prez. Raimundo Edmundo de Freitas; Vicprez. Murilo Pacheco de Menezes; 1-a sek. Raimundo R. de Albuquerque; 2-a sek. Maria Dolores Palmério; 1-a kas. Carício M. Borges; 2-a kas. José La Guardia.

MATO GROSSO

Campo Grande — Estas fondita Campo Grande Esperanta Klubo, kies unua estraro estas: Prez. Prof. Maria Ribeiro Serra; Vic. prez. Ten. Carlos da Silva; 1-a sek. Prof. Maria Garcia Pereira; 2-a sek. Washington Alves; 1-a kas. Ten. Antônio C. de Queiroz; 2-a Sek. Cb. Renato Ferreira; Orat. Elio Rezende; Socia dir. Sgt. Hermenegildo Leão; Jur. prokur. D-ro Luiz Alexandre de Oliveira.

APERFEIÇOE O SEU CONHECIMENTO

A HISTÓRIA

Há nos homens uma viciosa inclinação para mal julgar do presente, que acham mau em comparação com o passado. É uma ilusão nascida de que o presente é julgado pela nossa própria experiência e o passado pelo testemunho da história, que é uma grande hipócrita.

Pura ilusão de perspectiva. Passado e presente equivalem-se, porque são apenas momentos diferentes em que se exteriora a intenção de um ser igual em todos os tempos, o homem.

O presente, apanhado em flagrante, pela nossa observação, não tem meios para compor-se e enfeitar-se com as aparências da moralidade, da virtude e do heroísmo.

A história, que fotografa o passado, não-lo transmite alinhado, sem as rugas da sua fealdade moral, sem os estigmas que os vícios gravam na frente dos seus escravos.

Ela só narra actos, não prescruta intenções. É por isso que nos logra, quando julga os homens pelo seu exterior.

Gumercindo Bessa

A tradução do presente trecho virá no número seguinte, para confronto com a dos interessados.

44.º CONGRESSO UNIVERSAL DE ESPERANTO

O *Brazila Esperantisto* publicará na sua próxima edição o minucioso e interessante relatório apresentado pelo Dr. Luis de Azeredo Coutinho sobre o Congresso Universal do Centenário de Zamenhof, que se realizou em Varsóvia, no país natal do autor

do Esperanto, de 1.º a 8 de Agosto deste ano.

O Relatório será ilustrado com belas fotografias.

Nesse Congresso inscreveram-se 3.256 pessoas, das quais segundo a estatística constante do Livro editado pela Comissão Organizadora, 5 do Brasil, sendo os seguintes os seus números de inscrição e nomes, encimados nos volumes pelas armas do país:

- 17 — L. de Azeredo Coutinho
- 21 — Carlos Domingues
- 54 — Miguel Timponi
- 1515 — Délio Pereira de Sousa
- 2392 — Octaviano Curvelo de Sousa

O Dr. Azeredo Coutinho, que dos inscritos foi o único que compareceu, representou na magna assembléia o Governo Brasileiro, por designação do Ministério das Relações Exteriores, e a Liga Brasileira de Esperanto, tendo discursado na sessão solene de abertura como delegado de ambos. Tomou parte ativa nos debates da Junta Diretora da U.E.A. como Membro eleito pela B.E.L. Visitou depois vários centros esperantistas, notadamente da Suécia, Suíça e Itália, tendo, assim realizado uma viagem cheia de proveitosos ensinamentos para o Movimento em nossa terra.

NEKROLOGO

Arminio de Moraes

Post longa malsano mortis en la 2-a de Okt. nia estimata samideano Arminio de Moraes, emerita oficisto de Banco do Brasil, unu el la pioniroj de Esperanto en Brazilo. Li estis fondinto de Brazila Klubo-Esperanto en 1906, kaj ĝis lia morto li restis sindona membro de tiu organizo, kaj ĉiam dediĉita al Esperanto. Ni esprimas sinceran kondolencon al la familio de nia Arminio.

ESPERANTO-SOCIETO DE MINAS GERAIS

STATUTO

II — Membreco

I — Ĝeneralaj principoj

1. Nomo — Esperanto-Societo de Minas Gerais (ESMG), fondita la 10-an de marto 1945 kun la tiama nomo "Esperanto-Klubo Azeredo Coutinho", estas privatjura personajo regulata de ĉi tiu Statuto, kies sidejo, administracio kaj jura forumo situas en la urbo Belo Horizonte (Minas Gerais, Brazilo).

2. Celoj — Ĝiaj celoj estas:

- Disvastigi la uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto.
- Plifaciligi la spiritaĵn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, sen diferenco pri nacieco, raso, religio, politiko aŭ lingvo.
- Kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco, kaj disvolvigi ĉe ili la komprenon kaj estimon por fremdaj popoloj.
- Orientigi la Esperanto-movadon en la Ŝtato Minas Gerais.
- Kiel organizaĵo veranta kaj reprezentanta de Brazila Esperanto-Ligo kaj de Universala Esperanto-Asocio, plenumi internaciajn servojn uzeblajn de ĉiuj homoj, kies intelekta aŭ materiala intereso celas trans la limojn de ilia genta aŭ lingva teritorio.
- Okazigi la Ŝtatajn Esperanto-Kongresojn kaj aliajn sociajn kaj kulturajn kunvenojn en Minas Gerais.

3. Neŭtraleco — Ĝis la limoj difinitaj de la brazilaj leĝoj, ESMG estas tute neŭtrala rilate al nacieco, raso, religio, politiko kaj sociaj problemoj.

4. Aliĝo — Por atingi siajn celojn, ESMG estas aliĝinta asocio de Brazila Esperanto-Ligo kaj, sekve, de Universala Esperanto-Asocio.

5. Statuto — Ĉi tiu Statuto estis aprobita en Ĝenerala Kunsido, okazinta la 29-an de marto 1959.

6. Lingvo — ESMG uzas la portugalan lingvon en siaj rilatoj kun la brazilaj aŭtoritatoj kaj ne-esperantistaj nacioj; Esperanto estas ĝia oficiala lingvo por ĉiuj rilatoj internaciaj kaj kun la esperantistoj de la lando.

7. Membro-kategorioj — La Societo havas la jenajn kategoriojn de membroj:

- Asociaj membroj (AM), are aliĝitaj de la aliĝintaj asocioj.
- Individuaj membroj:
 - Patronoj (Pat).
 - Subtenantoj (Sub).
 - Simplaj membroj (SM)
- Honoraj membroj (HM)

8. Akcepto — La kondiĉoj por la akcepto de membroj estas:

- Aliĝintaj asocioj: esti regulataj de statuto, kiu ne malakordigas de tiu de ESMG.
- Individuaj membroj: esti honorindaj personoj, laŭ konsidero de la Estraro de ESMG.
- Honoraj membroj: esti proponitaj de la individuaj membroj kaj akceptitaj de la plimulto de la ĉeestantoj, en Ĝenerala Kunsido.

9. Rajtoj — La membroj rajtas:

- Frekventi la socian sidejon de ESMG.
- Partopreni en la Ĝeneralaj Kunsidoj laŭ subparagrafo 28b, kaj en ĉiuj sociaj kaj kulturaj kunvenoj.
- Voĉdoni kaj esti elektitaj por la postenoj de la Estraro.
- Uzi la Bibliotekon de ESMG kaj la servojn plenumatajn laŭ paragrafo 2e de ĉi tiu Statuto.

10. Devoj — Estas devoj de la membroj:

- Aliĝintaj asocioj: funkciigi en siaj lokoj la servojn plenumatajn de ESMG, kaj kunlabori kun ĝi en la okazigo de la Ŝtataj Esperanto-Kongresoj kaj de la sociaj kaj kulturaj kunvenoj.
- Individuaj membroj: regule pagi la kotizojn fiksitajn en Ĝenerala Kunsido.
- Honoraj membroj: akcepti sian aligon al la membraro de ESMG.

11. Eksiĝo kaj eksigo.

a) Estas motivoj por eksigo aŭ eksigo de la membroj:

- (1) Eksiĝpeto de la membroj.
- (2) Malobeo al la principo de neŭtraleco observata de ESMG.
- (3) Sinteno aŭ agado kontraŭa al la intereso de la Esperanto-movado.
- (4) Perdo de la honorindeco.
- (5) Nepago de la kotizoj koncernej al tri sinsekvaj monatoj sen prava motivo.

b) Decidas pri la eksigo de membroj:

- (1) Aligintaj asocioj kaj honoraj membroj: la plimulto de la ĉeestantoj, en Ĝenerala Kunsido.
- (2) Individuaj Membroj: la plimulto de la ĉeestantoj, en Estrara Kunsido.

III — Komitato

12. Konsisto — La Komitato de ESMG konsistas el la Estraro kaj la Komisionoj.

13. Estraro — La Estraro konsistas el la jenaj membroj: Prezidanto, Vic-Prezidanto, Sekretario, Helpa-Sekretario, Kasisto, Helpa-Kasisto kaj Bibliotekisto.

14. Elektro de la Estraro — La estraranoj estas elektataj de la plimultaj ĉeestantoj, en Ĝenerala Kunsido, por dujara oficperiodo. Tamen la membroj ĉiam rajtas esprimi sian malkonfidon al la ajn estrarano, en Ĝenerala Kunsido, kaj elekti alian anon por anstataŭi lin.

15. Rolo de la Prezidanto — La Prezidanto:

- a) Reprezentas ESMG en juraj kaj nejuraj aferoj.
- b) Prezidas la Ĝeneralajn Kunsidojn, Estrarajn Kunsidojn, Esperanto-Kongresojn kaj sociajn aŭ kulturajn kunvenojn okazigitajn de ESMG.
- c) Kunvokas Estraran Kunsidon, kiam li opinias tion necesa.
- d) Kunvokas Ĝeneralajn Kunsidojn laŭ decido de la Estraro aŭ peto de triono de la membraro.

e) Aprobas elspezojn kaj subskribas kun la Kasisto ĉekojn, pagmandatojn kaj aliajn dokumentojn rilatajn al ekonomiaj kaj financaj aferoj de la Societo.

f) Decidas, depende de aprobo de la Estraro aŭ de Ĝenerala Kunsido, pri demandoj, kiuj, pro sia urĝeco, ne povas atendi kunvenon de la Estraro aŭ de la membroj.

g) Ĉe la fino de sia oficperiodo prezentas la raporton pri la agado de ESMG.

16. Rolo de la Vic-Prezidanto — La Vic-Prezidanto:

— Anstataŭas la Prezidanton dum liaj malhelpoj aŭ delegite de li.

17. Rolo de la Sekretario — La Sekretario:

a) Plenumas ĉiujn rutinajn sekretariajn laborojn, kiujn la Prezidanto donas al li.

b) En speciala libro raportas la decidojn de la Estraro kaj protokolas la Ĝeneralajn Kunsidojn.

c) Kunmetas la raporton pri la agado de ESMG, kiun la Prezidanto devas prezenti ĉe la fino de la estrara oficperiodo.

d) Anstataŭas la Vic-Prezidanton dum liaj malhelpoj.

18. Rolo de la Helpa-Sekretario — La Helpa-Sekretario:

a) Anstataŭas la Sekretarion dum liaj malhelpoj.

b) Plenumas la sekretariajn taskojn, kiujn la Sekretario donas al li.

19. Rolo de la Kasisto — La Kasisto:

a) Enkasigas ĉiujn monsumojn enspezitajn de la Societo.

b) Kolektas aŭ faras kolekti la enspezon de ESMG.

c) Subskribas kun la Prezidanto ĉekojn, pagmandatojn kaj aliajn dokumentojn rilatajn al ekonomiaj kaj financaj aferoj de la Societo.

d) Pagas la elspezojn aprobitajn de la Prezidanto.

- d) Tenas la kaslibrojn de ESMG, kaj kunmetas bilancon, por raporti pri la spezoj, ĉe la finiĝo de la oficperiodo de l' Estraro aŭ, en iu ajn alia okazo, se la Prezidanto ordonas.

20. Rolo de la Helpa-Kasisto — La Helpa-Kasisto:

- a) Anstataŭas la Kasiston dum liaj malhelpoj.
b) Plenumas la kasistajn taskojn, kiujn la Kasisto donas al li.

21. Rolo de la Bibliotekisto — La Bibliotekisto:

- a) Organizas la Bibliotekon de ESMG, kaj kontrolas ĝian utiligon laŭ la koncerna regularo.
b) Gvidas la legorondo(j)n de la Societo laŭ la koncerna regularo.
c) Funkciigas por la membroj de ESMG la servojn de mendado de libroj kaj abonado de revuoj en rilato kun, almenaŭ, Brazila Esperanto-Ligo kaj Universala Esperanto-Asocio.
d) Konservas en bonordo la socian sidejon de ESMG, zorgante pri la gardo kaj konservado de la materialo, kiu troviĝas en ĝi.

22. Eksiĝo de estraranoj:

- a) La Estraro estas kompetenta por akcepti la ekxiĝpetojn de siaj membroj.
b) La plenumo de la vakantaj postenoj de Sekretario, Helpa-Sekretario, Kasisto, Helpa-Kasisto kaj Bibliotekisto estas farata per elekto de la Estraro; tiu de la vakantaj postenoj de Prezidanto kaj Vic-Prezidanto per elekto de la plimulto de la ĉeestantoj, en Ĝenerala Kunsido.

23. Komisionoj — La komisionoj konsistigas la plenumajn organojn de la agado de ESMG. Estas fundamentaj la Komisiono por Informado, la Komisiono por Instruado kaj la Komisiono por Kultura Vivo: krome la Estraro povas organizi aliajn specialajn komisionojn, se ĝi konsideras tion necesa, por malpezigi la taskojn de la fundamentaj komisionoj.

24. Organizo de la Komisionoj.

- a) Estras la komisionojn direktoroj (Direktoro por Informado, Direktoro por Instruado, Direktoro por Kultura Vivo, ktp) nomitaj de la Estraro de ESMG.
b) La direktoroj submetas al aprobo de la Estraro de ESMG la nomojn de la ceteraj anoj, kiujn ili elektas por konsistigi siajn komisionojn.
c) Interne la komisionoj povas dividiĝi en subkomisionojn, por pli bone zorgi diversajn aspektojn de la agado al ili koncernantaj.
d) Ĉiu komisiono estas gvidata de unu aŭ pli da regularoj, aprobitaj de la Estraro de ESMG.
e) En iu ajn tempo la Estraro de ESMG povas anstataŭi membrojn de la komisionoj pro ekxiĝo aŭ ekxiĝo kaj ankaŭ nomi al ili novajn membrojn. La procedo estas la sama, observata por la starigo de la komisionoj.

25. Komisiono por Informado. — La Komisiono por Informado:

- a) Vekas la plej grandan publikan intereson pri Esperanto en la Ŝtato Minas Gerais, ĉefe en Belo Horizonte, sekvante la agliniojn indikitajn de Brazila Esperanto-Ligo kaj de Universala Esperanto-Asocio.
b) Preparas la regularo (j)n de la Komisiono kaj ĝiajn monatajn programojn, kaj submetas ilin al la aprobo de la Estraro de ESMG.

26. Komisiono por Instruado — La Komisiono por Instruado:

- a) Disvastigas la instruadon de Esperanto en la niveloj elementa, supera kaj profesora, funkciigante kursojn kaj helpante ĉiumaniere la aliĝintajn asociojn kaj la individuajn instruistojn.
b) Preparas la regularo(j)n de la Komisiono kaj ĝiajn monatajn programojn, kaj submetas ilin al la aprobo de la Estraro de ESMG.

27. Komisiono por Kultura Vivo — La Komisiono por Kultura Vivo:

- a) Tenas viglaj la entuziasmon kaj la intereson de la esperantistoj pere de allogaj agadoj, kiel kongresoj, prelegoj, kulturaj interŝanĝoj, memorigaj solenoj, festoj, klerigaj, artaj kaj amuzaj kunvenoj, legado, kolektiva korespondado, ktp.
- b) Preparas la regularo(j)n de la Komisiono kaj ĝiajn monatajn programojn, kaj submetas ilin al la aprobo de la Estraro de ESMG.

28. Kunvenoj de la Societo:

- a) ESMG okazigas tri specojn de kunveno: Ĝenerala Kunsido, Estrara Kunsido kaj sociaj aŭ kulturaj kunvenoj.

- b) Ĝenerala Kunsido — Tiu estas la kunveno, al kiu estas kunvokataj la individuaj membroj, la reprezentantoj de la aliĝintaj asocioj kaj la honoraj membroj: ĝi celas:

- (1) Elekti la Estraron de la Societo laŭ paragrafoj 14 kaj 22 de ĉi tiu Statuto.
- (2) Decidi pri aferoj preterlasitaj en ĉi tiu Statuto, aŭ aprobi agojn de la Prezidanto, faritajn konforme al subparagrafo 17f.
- (3) Akcepti aŭ eksigi aliĝintajn asociojn kaj honorajn membrojn.
- (4) Fiksi ĉiujare la monatan koton por la membroj konforme al subparagrafo 10b de ĉi tiu Statuto.

- c) Estrara Kunsido — Tiu estas la kunveno, al kiu estas kunvokataj ĉiuj estraranoj de ESMG kaj membroj de la Komisionoj, speciale difinitaj de la Prezidanto; ĝi celas:

- (1) Elekti la direktorojn de la Komisionoj kaj aprobi la indikon de la ceteraj membroj por konsistigi tiujn komisionojn konforme al la subparagrafoj 24 kaj 24e.
- (2) Aprobi la regularojn kaj programojn de agado de la komisionoj.

- (3) Elekti anstataŭantojn por okupi la postenojn, kiuj vakas en la Estraro dum ĝia oficperiodo konforme al paragrafo 22 de ĉi tiu Statuto.

- (4) Decidi depende de aprobo de Ĝenerala Kunsido, pri demandoj, kiuj, pro sia urĝeco, ne povas atendi kunvenon de la membroj.

- (5) Aprobi agojn de la Prezidanto, faritajn konforme al subparagrafo 17f.

- (6) Kunvoki Ĝeneralan Kunsidon por la celoj de subparagrafo 28b aŭ, eksterordinare, por esprimi sian malkonfidon al iu estrarano, kaj elekti lian anstataŭanton konforme al lasta parto de paragrafo 14.

- (7) Akcepti aŭ eksigi membrojn.

- d) Sociaj kaj kulturaj kunvenoj — Tiuj estas kunvenoj organizataj de la Komisiono por Kultura Vivo, al kiuj estas kunvokataj ĉiuj membroj de ESMG.

- e) Kunvokado — La jenaj reguloj estas observataj:

- (1) Ĉe la unua kunvoko Ĝenerala aŭ Estrara Kunsido okazas je la horo kaj dato fiksita, se ĉeestas minimume triono de la kunvokitoj; ĉe la dua kunvoko ĝi okazas je la horo kaj dato fiksita kun iu ajn nombro da ĉeestantoj.

- (2) Ĝenerala Kunsido estas kunvokata per la oficiala organo de la Stato Minas Gerais unu semajnon antaŭ la dato. Kun la konsento de la Prezidanto la Sekretario ankaŭ povas utiligi samcele ĉiujn aliajn rimedojn de informado.

- (3) Estrara Kunsido estas kunvokata de la Sekretario per la voĉo, per telefono, per letero aŭ telegramo minimume du tagojn antaŭ la dato.

- (4) La kunvoko al socia aŭ kultura kunveno rezultas el la diskonigo de la programo por la agado de la Komisiono por Kultura Vivo, utiligante rimedojn laŭ ĝia elekto.

29. Dissolvo de la Societo:

- a) La dissolvo de Esperanto-Societo de Minas Gerais okazos, se tion decidis la plimulto de la ĉeestantoj, en Ĝenerala Kunsido.
- b) La sama Ĝenerala Kunsido fiksos la destinon por la restanta havaĵo de la Societo; precipe ĝi estas donacata al alia esperanto-societo.

30. Valideco de la Statuto — Ĉi tiu Statuto validas ekde la dato de ĝia aprobo, en Ĝenerala Kunsido, okazinta la 29-an de marto, 1959.

LASTAJ EKZEMPLEROJ

Libroj elĉerpitaj ĉe la eldonistoj, de kiuj la Libroservo de B.E.L. ankoraŭ havas malgrandan provizon:

	Cr\$
KVAROPO. Auld, Dinwoodie, Francis, Rossetti. Originalaj poemoj	350,00
LA BAPTO DE CARO VLA-DIMIR. Legendo el la rusa historio. Borovsky. Trad. T. Pumpr	300,00
KOKO KRIAS JAM. F. Szilágyi. Originala novelaro	350,00
LA INFANA RASO. Poemo en 25 capitroj. W. Auld	350,00
NAIVECO DE PASTRO BROWN. Chesterton. Trad. C. Bean. Detektiva aventuro	250,00
LA VOJO RETURNE. Remarque. Trad. J. F. Berger. Problemoj de la vivo por eksoldatoj post la milito 1914-1918	250,00
LA KNABOJ DE PAŬLO-STRATO. Molnár. Trad. Spierer. Alloga rakonto pri knabaj "bataloj"	100,00
UNDINO. O. Schreiner. Trad. S.A. Andrew. Malfacilaĵo de virina vivo en Sud-Afriko en la pasinta jarcento	250,00
LA VIRINETO EN BLUO. Kaj aliaj rakontoj. M. Stuttard. Seriozaj kaj amuzaj rakontoj ..	100,00

REVISTAS

Assinatura anual

	Cr\$
Amerika Esperantisto	300,00
Belarto	180,00
Boletín	280,00
British Esperantist	350,00
El Popola Ĉinio	80,00
Esperanto	550,00
Esperanto en Skotlando	90,00
Espero Katolika	350,00
Franca Esperantisto	230,00
Geografia Revuo	250,00
Heroido de Esperanto	500,00
Internacia literatura revuo	270,00
La Praktiko	350,00
La Suda Stelo	350,00
L'esperanto	200,00
Norda Prismo	450,00
Norvega Esperantisto	270,00
Nuntempa Bulgario	350,00
Omoto	200,00
Scienca Revuo	480,00
Svenska Esperanto-Tidningen ..	400,00
Svisa Espero	270,00

Brazila Esperantisto (Distribuido aos aos socios da B.E.L.).

Coleção dos anos de 1953 a 1958 —
Cr\$ 300,00

Encadernada: Cr\$ 500,00.

KATOLIKAJ LIBROJ

	Cr\$
MALGRANDA KATOLIKA KATEKISMO. Originale verkita en Esperanto de Sac. J. Biancinini	50,00
AL ALTARO DE DIO. Thalmaier	40,00
IMITADO DE KRISTO. T. H. a Kempis. Frat. Wigbertus van Zon L. K. simpla bind	180,00
..... luksa bind	220,00
PREGARETO KATOLIKA. Carolfi	30,00
TUTMONDA LAŬDO. P. Wanne-makers S.J.E.	300,00